

1981 februaro

74-a jaro

n-ro 902 (2)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Tallinn: Hilda Dresen meritas monumenton tie

Vi trovos,

fine de ĉi tiu numero, en tiu "oficiala" rubriko (kiun vi eble neniam legas?), ke la sumo de ĉiuj heredaĵoj kaj donacoj al UEA en la pasinta jaro estis pli ol 123 000 guldenoj. Impona sumo! Ĝi elokvente parolas pri la fido de la membraro al sia Asocio. Refoje dankon kaj antaŭdankon samtempe! Ni havas apartan peton al vi ĉi-foje. Ne temas pri donacoj, ĉar vi tiujn grandanime sendas eĉ sen aparta peto. Pri io alia ni parolas: legu atente ĉi tiun numeron. Ankaŭ vi, kiuj ial opinias, ke vi ne estas por la poezio aŭ, ke la poezio ne estas por vi. Bonvolu legi la versaĵojn, kiuj trateksas la paĝojn pri la forpasinta poetino Hilda Dresen. Vi vidos, vi devos vidi, ke la poezia lingvo ne estas nepre io por timigi la "ordinarajn" legantojn. Ĝi simple estas bela, neta lingvo, kie post atenta kribro forfalis la tuta balasto. Cetere, dankon pro la demando pri nia farto. Ni celas tiujn niajn promesojn pri la reakuratigo de la revuo. Nu, vi devus almenaŭ rimarketi, ke ni estas survoje al la plenumo de la promeso. Kial, pro la Fundamento, vi mem tiel longe silentas kaj sendas al ni nenian novaĵon?

Enhavo

- 21 Kongresa temo por Brazilio: Kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj (Baldur Ragnarsson)
- 23 Enketoj: Usonaj sciencistoj akceptus Esperanton (R. Kent Jones)
- 24 Gazetoj kaj informoj: Provo pesi novaĵon (S. Milojević)
- 25 Hilda Dresen (1896-1981): Ni ne trovos ŝian anstataŭanton (W. Auld)
- 26 Memoraĵo pri Hilda Dresen: Ne estingita scivolemo (G. Waringhien)
- 27 Rimportreto XVI (K. Kalocsay); Mortis Hilda Dresen (M. Boulton)
- 28 Instruado: Antaŭ ol komenci Esperanto-kurson (Andrzej Pettyn)
Lingvo: Sufikso -eco kaj adjektivaj radikoj (Henrik Seppik)
- 30 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 66a Universala Kongreso en Brazilo)
- 32 Recenzoj: "Joĉjo, la amiketo" de Elsa Otto (Marjorie Boulton); "La vivo estas tute alia" de F.W. Poppeck (W.A.M. van Heugten); "Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj" de Marinko Gjivoje, kaj "Biblioteka manlibro" de Herbert März (Gerrit Berveling); "Per nia nura vol'" de Suzana Kasteiviva k.a. (Adrian Hall); "Lidja Zamenhof; Vivo kaj agado" de Isaj Dratwer (W. Krikke)
- 34 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 35 TEJO-paĝo: Eksteraj rilatoj: En Esperanto antaŭ granda forumo (Elisabeth Schwarzer); 37a Internacia Junulara Kongreso en Meksikio
- 36 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 38 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 39 Ekzameno E (Bernard Golden); Esperanto en radio (G. Larglantier)
- 40 Anoncetoj

La kovrilo

Forpasis la unua damo de la Esperanta kulturo. Antaŭ monato ni pensis, ke la 11an de majo ĉi-jare Hilda Dresen estus fariĝinta 85-jara. La vivofino venis anstataŭ la vivjubileo. Kiel W. Auld diras (p.25) komence de sia inspira eseo pri la forpasinto, necesas esti esperantisto por kompreni la rapidecon per kiu la informo pri la morto de Hilda Dresen disflugis tra la mondo. Ni aldonu al tiuj frazoj de Auld, ke la saman tagon, la 5an de februaro, kiam Dresen mortis, UEA telefonis al Moskvo, por ke oni de tie telefonu al Tallinn kaj mendu adiaŭan florkronon por la forpasinta Honora Membro de la Asocio. Ankaŭ Marjorie Boulton spontane verkis la rondelon (p.27), kun tiu bela fina verso: "Paduso daŭre blankpetalas." Nia titola bildsubskribo volas apogi la penson de Auld, ke Hilda Dresen meritas monumenton en Tallinn. Multaj el ni, en cento da landoj tra la mondo, eble eĉ ne sciis kie troviĝas Estonio, se Hilda Dresen per sia vivolonga laboro ne estus donacinta ĝin al ni.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nw Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 91 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italio; tel. (06) 29 26 07.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario.

Estrarano pri esploroj, edukado kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 382-5874.

Kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj

LA ĈEFTEMO de la 66a UK en Brazilio estas tiel vasta kaj komplika, ke ĝia divido en subtemojn pli regeblajn estas evidente necesa. La sekvantaj pensoj havas la celon proponi iujn vojojn al orientiĝo pri la temkomplikeco el tri vidpunktoj: sociologia, nacikultura kaj ĝenerala.

A. El vidpunkto **sociologia** (etnologia, antropologia, kulturhistoria) la termino "kulturo" teknike inkluzivas ĉian socie hereditan aŭ kondiĉitan elementon, materian kaj spiritan, en la vivo de ĉiu homo aŭ, prefere, homgrupo. Ĉiaj tradiciaj kutimoj, uzoj, sintenoj tie enestas, kune kun ĉiaj rezultoj kaj atingoj de kolektivaj efikoj kaj kondiĉoj. El sociologia vid-

punkto ĉiu homgrupo (ĉiu homo) estas ĉi tiel "kulturita", kvankam en vaste diversaj manieroj kaj gradoj de komplikeco. La sociologo ne kutime aljuĝas valorojn (moralajn) al tiuj gradoj kaj manieroj.

El la aktuala vidpunkto de la kongresa temo ŝajnas plej fruktodone enfokusigi la diskuton je tiaj sociologiaj aspektoj, kiuj manifestiĝas en la interefikado de vivkondiĉoj kaj vivniveloj en la moderna teknologia socio unuflanke, kaj la rilataj kulturo kaj lingvo aliflanke.

Diskutindaj demandoj estas ekzemple:

1. Kiaj tendencoj en difinitajn direktojn estas konstateblaj en la moderna amaskulturo? (Ĉi tie oni povas konstati, ekzemple, la tendencojn al la plej malalta komuna denominatoro, al kreo de komunaj imagoj kaj mitoj, al kreo de sento pri atingeblo al la tuta mondo pere de la amaskomunikiloj, kaj al pasivigo).
2. Kiaj estas la efikoj de la specialisma komplikeco en la moderna teknologia socio sur la vivon de "ordinaraj" homoj?
3. Kiaj estas la efikoj de la evoluo al dualismo prezentata unuflanke de la ĉioampleksa industria kulturformado de la amaskomunikiloj, kie la partopreno de la individuo estas kutime sensignifa, aliflanke de la malvasta kultura sfero de la individuo en lia/ŝia propra ensocia niĉo?
4. Kiel manifestiĝas la diferencaj kulturoj formiĝantaj interne de la sociaj tavoloj en kunligo kun la ĝeneralaj vivkondiĉoj, laboro, edukado?
5. Kiel manifestiĝas la apartaj lingvoformoj de diferencaj sociaj grupoj, kaj kiel konstateblas iliaj efikoj sur la eblecojn de edukado kaj promociiĝo en la socio? (Ĉi tie oni eniras la terenon de valoroj, kio ŝajnas malfacile evitebla, kiam la diskuto estas bazita sur la nocioj de "pontoj" kaj "baroj").

6. Kiaj baroj estas konstateblaj inter la generacioj? (Ja estas konstateblaj apartiĝantaj kulturoj kaj lingvouzoj).

B. La **nacikultura** vidpunkto diferencas de la sociologia ĉefe en tio, ke ĝi akcentas spiritajn kaj emociajn valorojn pli ol sciencajn kaj objektivan observadon.

"Kulturo" el tiu vidpunkto konsistas el selektitaj faktoroj el la vasta tutaĵo de la socia kulturfluo, kiel esence pli valoraj, pli karakterizaj, pli signifaj en spirita senco ol la ceteraj. Tia kultura koncepto kunigas en subjektive difinitan tutaĵon tiajn ĝeneralajn sintenojn, tiajn vivopiniojn, tiajn specifajn manifestiĝojn de civilizacio, kiuj donas al iu aparta popolo distingitan lokon en la mondo.

Diskutindaj demandoj povus esti:

1. Kiel formiĝas nacia kulturo? (Rezulto de diversdevenaj faktoroj "selektitaj" per ia historia proceso — Brazilo ja estas bona ekzemplo, kie la kulturoj de



Karnavalo en Rio: Ĝi estas ne nur socia sed ankaŭ kultura fenomeno, kiu restas enigmo por ne-brazilanoj.

Amaso da kongresanoj en Stokholmo atente sekvis kaj partoprenis la traktadon de la kongresa temo: Ĉu la samo ripetigos ankaŭ ĉi-jare en Brazilio?



sudamerikaj indianoj, afrikaj negroj kaj portugaloj formis la modernan brazilan vivon).

2. Kiuj elementoj konsistigas nacian kulturon? (Lingvo kaj literaturo, muziko, dancoj, religio, tradiciaj kutimoj, historiaj eventoj, ktp).

3. Kiaj estas la rilatoj inter apartaj naciaj kulturoj? (Ĉeesto aŭ manko de "pontoj"; ĝis kiom devas atingi la diferencoj por efiki kiel "baroj"?)

4. Kiaj estas la rilatoj inter nacia kulturo kaj lingvo? Inter ŝtata lingvo kaj ties dialektoj? (Ĉi tie oni verŝajne havas aparte diskutindan temeron, kiu cetere plektiĝas en la sociologian aspekton: kiomgrade la uzo de senteble diferencaj dialektoj kreas barojn interne de ŝtato, kaj kiel oni traktas tiun problemon en la diversaj ŝtatoj?)

5. Kia estas la situacio de la malgrandaj naciaj kulturoj kaj lingvoj sub ĉiam pli fortiĝantaj influoj de la "grandaj" kulturoj kaj lingvoj, altrudantaj siajn proprajn "pontojn" en malpli fortajn teritoriojn kulturajn kaj lingvajn?

C. El **ĝenerala** vidpunkto oni povas paroli pri tia koncepto de kulturo, kiu enhavas faktorojn de tuthomara valoro kaj celas al konstruo de kultura komuneco de ĉiuj homoj. Tiu koncepto ĉefe baziĝas sur agnosko de la ĝenerala valoro de selektitaj faktoroj el la diversaj nacikulturoj, sur la atingoj de la sciencoj kaj la belaj artoj, kaj sur pozitivaj rezultoj en la batalado por homaj rajtoj kaj egaleco tra la mondo.

Ekzemploj de diskutindaj demandoj:

1. Kiaj faktoroj baras la vojon al pli konscia formiĝo de ĝenerala kulturo en la mondo? (Ekonomiaj, religiaj, lingvaj, politikaj k.a.)

2. Kiuj faktoroj havas ĉi tie "pontan" valoron? (La tutmondaj eblecoj de teknika interkomunikado, la neŭtraleco de sciencaj atingoj, mondliteraturo, muziko, turismo, internacia lingvo, kaj pliaj).

Kiel enplekti la problemon de internacia lingvo en la diskuton?

1. **Sur la sociologia nivelo.** Pensante pri sociolingvistikaj teorioj oni tuj renkontas la esplorojn de Basil Bernstein pri la "limigita" kaj "ellaborita" kodoj de lingvo. Kiel plenpova lingvo Esperanto estas nun uzata preskaŭ nur sur kampoj, kie la ellaborita kodo de lingvo sin asertas kiel ĉefa esprimmaniero. Ĉu oni povas rigardi la kodan ellaboritecon de Esperanto kiel esplorindan, provindan kaj eventuale rekomendindan rimedon por la servo de lingva edukado ĝenerale? Ĉu eventuale saĝmaniera instruado de Esperanto al lernantoj el medioj de limigita kodo de nacilingvo povus helpi je la solvo de iliaj esprimaj problemoj?

2. **Sur la nacikultura nivelo.** Esperantistoj ĉiam insistis pri tio, ke Esperanto ne celas anstataŭi la naciajn lingvojn, sed servi kiel pontlingvo. Ĉu Esperanto estas aparte rekomendinda al malgrandaj nacioj kiel rimedo protekti ilian spiritan memstarecon kontraŭ la influoj de la grandaj nacioj en ilia kultura kaj lingva vivoj?

3. **Sur la ĝenerala nivelo.** Kiom konstatebla estas jam la kontribuo de Esperanto por krei ponton inter homoj sur tutmonda skalo? Kiaj estas ĝiaj latentaj kapabloj daŭre disvolvi novajn ĝeneralajn valorojn cele al kreo de konscio pri tuthomara kultura komuneco?

Baldur Ragnarsson,
estranano pri kulturo

Usonaj sciencistoj akceptus Esperanton

"MULTO ESTIS DIRITA lastatempe pri la problemoj, kiujn kaŭzas kaj kiuj estas antaŭvideblaj pro la fakto, ke la usonaj teknikistoj estas preskaŭ komplete unulingvaj. R. Kent Jones, ĉefa civila inĝeniero de la Metropola Sanitara Distrikto de Ĉikago kaj ĉirkaŭaĵo, emfazas, ke 'Lingva multeco estas serioza kaj kreskanta minaco al la esploraj kaj evoluigaj klopodoj en Usono. Malpli ol du procentoj de la sciencaj laborantoj flue uzas iun fremdan lingvon, kaj ankoraŭ malpli povas konversacii en du aŭ tri.' " Tiel komenciĝis la regula rubriko "Opinia enketo" en la monata usona revuo *Industrial Research and Development* (Industria esploro kaj evoluigo), en la numero de aŭgusto 1980. Ok ampleksaj demandoj estis prezentitaj al pli ol cent mil legantoj — ĉefe usonaj —, kiuj povis esprimi sian opinion per resendo de la enketa poŝtkarto. Ĉi-sube ni publikigas la rezultojn de la enketo "Kiu dua lingvo?", en la traduko de inĝ. R. Kent Jones, tiu sama el la supra citaĵo, cetere konata movada aktivulo, ne tute senkulpa rilate la iniciaton de la enketo. Jen la traduko, laŭ presprovaĵo por la numero de februaro 1981 de la usona revuo:

Universala lingvo povus helpi sciencon

Preskaŭ 3 el 4 sciencistoj kaj inĝenieroj, laborantaj en la kampo de esploro kaj evoluigo, opinias ke universala lingvo povus helpi sciencon, se la pli ol 2500 respondintoj al nia "Opinia enketo" pri ĉi tiu temo reprezentas ilin ĝenerale.

72% de la respondintoj opinias, ke universala esprimo por klasĉambra instruado, unueca normigita terminaro kaj la ebleco por tutmondaj TV-klasĉambroj per satelito estus inter la avantaĝoj de universala lingvo.

Kvankam 94% de la respondintoj indikis la anglan (aŭ usonan) kiel sian unuan lingvon, 27% diras, ke ili flue parolas almenaŭ unu alian gravan lingvon.

Pri Esperanto, ofte proponita kiel la ideala universala lingvo, 3% de la respondintoj indikis, ke ili povas


komuniki flue en Esperanto, kaj pliaj 3% menciis iujn Esperanto-kapablojn. Nur 18% diris, ke ili ne lernus Esperanton, eĉ se ili opinius ke ĝi ebligus universalan komunikadon inter sciencaj laboristoj. 62% diris, ke ili lernus Esperanton, kaj 20% estis nedecidemaj.

Kompletaj rezultoj de la "Opinia enketo":

- Ĉu vi parolas la anglan (aŭ la usonan) kiel vian "unuan lingvon" (lingvon de prefero)?
a. Jes. 94% b. Ne. 6%
- Post via "unua lingvo", ĉu vi flue parolas iun ajn alian gravan lingvon?
a. Ne. 73% ĉ. Tri. 1%
b. Unu. 23% d. Kvar. malpli ol 1%
c. Du. 9% e. Pli. malpli ol 1%
- Ĉu vi facile kaj bone legas kaj skribas en iu ajn lingvo krom via "unua lingvo"?
a. Ne. 66% ĉ. Tri. 1%
b. Unu. 23% d. Kvar. malpli ol 1%
c. Du. 9% e. Pli. malpli ol 1%
- Ĉu vi povas komuniki en Esperanto?
a. Flue. 3% b. Iomete. 3% c. Ne. 94%
- Ĉu vi konas personojn kiuj flue parolas Esperanton?
a. Ne. 92% c. Tri aŭ kvar. 2%
b. Unu aŭ du. 5% ĉ. Pli ol kvar. 1%
- Ĉu vi konsentus lerni Esperanton, se vi opinius, ke ĝi ebligus universalan komunikadon inter sciencaj laboristoj?
a. Jes. 62% b. Ne. 18% c. Nedecida 20%
- Ĉu vi opinias, ke eldonado en universala lingvo ebligus
a. Pli malmultekostan kontakton kun pli granda legantaro 10%
b. Pli da korektanta retrokuplo. 3%
c. Stabildajn signifojn tra jarcentoj. 6%
ĉ. Pli ol unu el la supraj. 49%
d. Neniun el la supraj. 32%
- Ĉu vi opinias, ke la uzo de unu lingvo por instruado ebligus
a. Tutmondajn TV-klasĉambrojn per satelito. 4%
b. Unuecan, normigitan terminaron. 9%
c. Universalan esprimadon por profesoroj ĉie. 2%
ĉ. Pli ol unu el la supraj. 57%
d. Neniun el la supraj. 28%

REDAKCIA NOTO: Tute interesa kaj el pluraj vidpunktoj nova enketo pri la Internacia Lingvo. Ni publikigas la kompletan tabelon de la enketaj rezultoj, ĉar por ni en la Esperanto-movado interesaj estas ankaŭ la rezultoj, kiujn en sia komento ne elstarigas la usona revuo. Ekzemple, la respondoj al la demando 5, kie 92 procentoj de la respondintoj konas neniun, kiu flue parolas Esperanton. Kiel inĝ. Jones skribis al ni en sia akompana letereto, estus pli ol interese, se similaj enketoj okazus ankaŭ en aliaj landoj.

Ĉikago, usona urbego el kiu venis la ĉi-supra enketo kun multaj surprizaj rezultoj




Provo pesi novaĵon

KUNLABORANTO, kiu scias kio estas novaĵo, legis en sia nacia ĵurnalo ion gravan pri Esperanto, tuj kopiis la artikoleon kaj sendis ĝin al ni. Temas pri jeno:

"Ĉinoj proponas Esperanton por UN

Ĉinio intencas por la sesa oficiala lingvo de Unuiĝintaj Nacioj proponi Esperanton. Kiel anoncas Hsinhua, dum la antaŭ nelonge okazinta fondkunveno de la Asocio de Esperantistoj de Pekino estis emfazite, ke la enkonduko de Esperanto kiel oficiala lingvo en Unuiĝintaj Nacioj egalrajtigus la grandajn kaj malgrandajn landojn en la monda organizaĵo. Pli ol mil studentoj lernas Esperanton en Pekino, ĉe dek kvar universitatoj en Ĉinio okazas kursoj de tiu lingvo, kaj proksimume 22 000 ĉinoj lernas Esperanton pere de korespondaj lernejoj."

Ĉi tiu artikolo aperis la 1-an de februaro 1981 en *Vjesnik*, ĉefĵurnalo de Kroatio (Jugoslavio). *Vjesnik* metis la novaĵon sur sian 14an paĝon. Kial tien, kaj ne sur la unuan paĝon? Kial ni ne donas al ĉi tiu informo la ĉefartikolan lokon?



Ĉinaj kaj japanaj esperantistoj sur la Granda Muro: Kiajn novaĵojn oni disheroldas de tie?

Ni ne publikigas la apudan informon por ke vi tuj ekredu, ke la "fina venko" estas ĉe la sojlo. Jes, tamen, vi kredu, ke ĝi estas survoje, ĉar sen tiu kredo ne eblas honeste aktivi en movado kiel la nia. Krome, la informo havas sian realan bazon kaj ĝi en la nacilingva gazetaro — ĝuste tie kie ĝi aperis — faras grandegan propagandan efekton. Kvankam ni do ne kredas je la ĉefa mesaĝo de la informo, ankaŭ ni trovas en tiu teksteto plurajn novaĵojn, kiuj preskaŭ kredebligas la ĉefan novaĵon. Pro ĉio ĉi ni provu detale ekzameni la apudan teksteton kaj ĝian signifon.

La unua parto de la novaĵo estas, almenaŭ el nia movada vidpunkto, tiel mondiskua, tiel grava, ke ni ne kuraĝus disheroldi ĝin sen tre zorga ekzameno de ĝiaj fontoj, sen aŭtoritata konfirmo de registara instanco de Ĉinio en ĉi tiu kazo. Tamen, la novaĵo venas de Hsinhua, kaj vi ja scias, ke tio estas la oficiala ŝtata novaĵagentejo de Ĉinio. Hsinhua verŝajne ne simple ludas per similaĵ informoj, precipe kiam ili koncernas ĝian propran landon. La dua parto de la informo, tio pri la nombro de ĉinoj, kiuj nun lernas la Internacian Lingvon, tio estas facile kredebla kaj en la nuna momento ne malpli grava novaĵo. Fakte, tiuj nombroj de la lernantaj ĉinoj donas tian pezon al la unua parto de la informo, ke la tuto fariĝas verŝajna. Ni volas diri, ke propono pri Esperanto en Unuiĝintaj Nacioj devus veni de lando, kiu havas dekmilojn da lernantoj de la Internacia Lingvo. Tia propono nuntempe povus veni ĝuste el la landoj kiaj estas Ĉinio aŭ Irano. Nur se ĝi venos de tie, la propono havos la necesajn pezon kaj gravecon, ĝi havos ŝancojn je sukceso. Tial, eĉ se la informo de la ĉina novaĵagentejo kaj la kroata ĵurnalo estas tro fruaj kaj subitaj, ni pensu, ke estas eble, ke estas verŝajne, ke tia grava novaĵo fakte venos el Ĉinio. Ĝi povus veni pli rapide ol ni supozas, kaj ni klopodu, ke tiu novaĵo ne surprizu nin.

Vi eble rimarkas, ke ni, subite, dediĉas al ĉi tiu ne konfirmita novaĵo el Ĉinio pli da spaco ol ni en la lastaj jaroj donis al la diversaj leĝproponoj aŭ aliaj parlamentaj klopodoj pri Esperanto en pluraj, ĉefe eŭropaj landoj. Nu, tio kio mankas al tiuj leĝproponoj kaj parlamentaj premgrupoj estas tiu ĉina fono, tiuj 22 000 korespondaj lernantoj, tiuj dek kvar universitatoj kun Esperanto-kursoj, tiuj centoj da iranaj geinstruistoj, kiuj lernas la Internacian Lingvon.

Fine, kial ni tiel detale pesis la novaĵon el Pekino? Ĉar la gazetaro en la Esperanto-movado ĝenerale ne faras tion kaj ne ekzamenas la informojn. Ĉu vi memoras, ke vi antaŭ kvin jaroj legis, ke la multnacia industria giganto "Coca Cola" pagos la kostojn de Esperanta broŝuro por la Olimpikoj en Montrealo? Proksimume samtempe vi povis legi, ke la fama brita muziktrupo "The Beatles" koncertos favore al la Internacia Lingvo aŭ, ke renoma tenisisto vetis por doni la gajnatajn dekmilojn da dolaroj al Esperanto. Nu, neniuj el tiuj grandaj novaĵoj realiĝis. Sed, pardonu, vi ne legis pri ili en ĉi tiu revuo. Ni provas pesi niajn novaĵojn.

sm

Ni ne trovos ŝian anstataŭanton

Petaloj de l' paduso drivas suben,
tegas la teron en funebra belo,
silenta larm' sur mia vang' ruliĝas
en noktmalhelo. . .

KIU POVAS, ekster la Movado, kompreni kio estas tio: esti esperantisto? La 5an de februaro 1981 mortis en Tallinn, ĉefa urbo en Estona SSR, eta virino, kies forpaso ne ŝancelis ŝian ŝtaton, nek ŝian urbon, ĉar ŝi estis nur modesta civitano; kaj tamen pri ŝia forpaso mi sciigis en malproksima Skotlando tiun saman tagon, kaj la sciigo profunde tristigis min. Kaj mi, miavice, transdonis telefone al aliaj tiun sciigon, kaj aliaj faris same, kaj tra la mondo tiu sciigo disvastiĝis rapidege, kaj en la plej diversaj lokoj la sciigo alportis malgajon kaj funebbron. Ĉar temis pri tio, kompreneble, ke la vivo de Hilda Dresen finfine estingiĝis.

Malgraŭ tio, ŝia forpaso ŝancelis nek ŝian urbon, nek ŝian ŝtaton. Mi dubas, ĉu tre baldaŭ ŝiaj samlandanoj starigos al ŝi monumenton en la ĉefplaco de Tallinn. Sed ĉiuokaze tia monumento nur ĝenus la poeton. Ŝi estis tia verkisto, kiu plene konscias siajn kapablojn, kaj malgraŭ — aŭ eble pro — tio, ĉiam restas modesta. Tiom pli bone, ke ŝi mem konstruis al si monumenton, kiu, kiel tiu de Horaco, "ol bronz' pli daŭre staras jam. . . supera laŭ la alto al pinto piramida": la verkaron.

Se preni en konsideron nur la revuojn *Literatura mondo*, *La nica literatura revuo*, *Monda kulturo* kaj *Norda prismo*, kiuj kune traarkis duonan jarcenton, ni konstata, ke en ili ŝi publikigis 122 poemojn el la estona, kune kun 31 el la rusa kaj 10 el la germana. (El la franca, cetere, ŝi tradukis ankaŭ la poemon "Spleno" de Baudelaire, kiu aperis en la prestiĝa *La floroj de l'*



Vizaĝo velkas, la spirito ne:
Hilda Dresen tra la ses
jardekoj da esperantista
agado

Kiam homo atingas sian 85an vivjaron, oni scias, ke la morto devos iam alveni. La postvivantoj konsolas sin asertante, ke tiu homo tamen ĝisvivis kontentigan aĝon. Tio estas vera kaj natura. Sed kiam oni korespondis ĝis la lasta momento kun 85-jara viglulo, la konsolo ne multe efikas. Oni sentas sin prirabita.

Kiel mi diris, ŝia patrujo ne ŝanceliĝis pro ŝia forpaso. Kaj tamen estas dirende, ke sen Hilda Dresen estas tre probable, ke mi — kaj centoj da aliaj — apenaŭ konscius pri tiu ŝia patrujo. Aliflanke, ĝuste pro ŝi mi kaj aliaj sentas grandan simpatian al la estona popolo, kaj al la kulturo de tiu relative malgranda homgrupo. Dank' al ŝi, mi interesiĝis pri la literaturo, kaj pro tio la historio, de tiu eta nacio, kaj ĝin ekamis. Ĉu estas tro grandioze pretendi, ke Hilda Dresen faris pli ol iu ajn alia estono por diskonigi eksterlande la kulturon de la estona popolo?

malbono.) Ankaŭ en la nova revuo *Fonto* aperas ŝiaj tradukoj, kaj kompreneble en multaj aliaj revuoj, ekz-e *Heroldo de Esperanto*, *La praktiko*, *La nova epoko*, *La suda stelo* k.a.

Ŝi tradukis el ĉiuj elstaraj estonaj poetoj; sed antaŭ ĉio el la verkaro de Marie Under, kiu mem mortis nur antaŭ kelkaj monatoj, preskaŭ centjara. Jam en 1929 ŝia unua volumo estis *Elektitaj versaĵoj* de Marie Under, kaj sian omaĝon al tiu poeto ŝi daŭrigis ĝis la lastaj semajnoj de sia vivo. Sekvis tiun volumon *Horizontoj* de Barbarus en 1931, kaj *Estona antologio I* en 1932. Hilda estis unu el kvin infanoj, el kiuj tri fratinoj* estis esperantistoj, kaj ankaŭ Helmi, kiu pereis

* Agnes, la tria fratino Dresen, vivas jam de multaj jaroj en Kanado. Ŝi ne okupiĝis pri literaturo, sed ĉiam restis fidela esperantisto kaj ĝis hodiaŭ membro de UEA.

dum la Dua Mondmilito, estis tre talenta tradukanto. Tiuj du fratinoj eldonis kune volumon de estonaj popolkantoj.

Hilda apartenis al tiu generacio, kiu spertis la teruraĵojn de du mondmilitoj. Dum la dua el ili, Esperanto konsolis ŝin dum la mallumaj tagnoktoj:

”Eble tio ŝajnas kurioza, sed mi penis traduki ĉiujn 50 sonetojn dum la kruela milittempo. Unue por havi iom da esperanta praktiko, ne forgesi la lingvon, due por forgesi la krudan realecon. Mi memoras, ke ofte dum alarmo mi ne rapidis en la ŝirmejon, sed daŭrigis trankvile la tradukadon, sidanta en mia ĉambro — en ligna dometo. En tiu tempo mi sentis grandan indiferecon koncerne la personan vivon, rilatis al ĉio fataliste. Tiel aperis la sonettraduko. . .” (LNL, III, 202).

Postmilito ŝi daŭrigis sian kontribuadon al la revuaro. Kontribuante ankaŭ al *Svisa antologio* (1939), ŝi kunhelpis ankaŭ pri la volumo *Versoj elektitaj* de Sergej Jesenin (1965), kaj en 1968 tradukis la versaĵojn en *Ŝippereo* de Smuul.

Dank’ al la eldonejo Eesti Raamat en Tallinn, kiu komencis eldoni belan kaj valoregan serion da libroj

tradukitaj en Esperanton el la estona, Hilda povis dum siaj lastaj jaroj riĉigi nian literaturon per kvar gravaj volumoj. (Ĉu sekvos ankaŭ aliaj post ŝia forpaso, el la abunda postlasita materialo? Ni kore esperu.) La unua el ili estis fragmentoj el la nacia eposo *Kalevipoeg* (1975). Tiu, verko de F.R. Kreutzwald (1803-1882), celis doni formon al la estona folkloro en la kadro de naskiĝanta nacia sento ĉe la estonoj. La finna *Kalevala*, aperinta en 1835, helpis inspiri ĝian kreadon, kaj kelkrilate, precipe prozodie, la du verkoj similas unu alian:

Linda, la vidvin’ veanta,
Per fosilo tombon fosis
Sub razeno rave verda
Kun dek-klafta profundeco;
En la lastan liton metis,
Ekkuŝigis ŝi la edzon,
Sian karan vivkunulon.

(*Kalevipoeg*, Dua kanto)

La verko aperis inter 1857 kaj 1861, kio atentigas ke, en realaj cirkonstancoj, la literaturo estona estas nemulte pli aĝa ol la Esperanta.

Per la dua el tiuj volumoj, *Estonia soveta poezio* (1977), Hilda saltis de antaŭhieraŭ ĝis hodiaŭ. Tio

MEMORAĴO PRI HILDA DRESEN:

Ne estingita scivolemo

DE POST la dua mondmilito, dum kiu tragike malaperis ŝia fratino Helmi, ŝi kaj mi interŝanĝis poŝtkartojn okaze de la Universalaj Kongresoj kaj de la novjaraj festoj. Mi retrovis jenan, skribitan fine de la jaro 1979: ĝi montras la viglecon de ŝia spirito kaj ŝian neestingitan scivolemon pri la Esperantaj aferoj, pli bone ol kiom povus fari biografo.

Lo! unu post l’alia la vivpetaloj falas...

G. Waringhien

14.XII.79

ESPEREBLE vi bonfartas, jen kiom da tempo pasis post Lucerno! Mi intencis skribi pli multe al vi, sed en la koro mankas la bezona trankvilo pro la nuntempa streĉa atmosfero tutmonda. Eble estontece mi pli tuŝos la esperantajn aferojn. Eble eĉ tie ne mankas postkulisaj agoj — sed ĉu mi ilin povus bone imagi, vivante tiel izolate, flanke de la nuntempa movado? Eble ankaŭ la maljuna kapo estas tro malforta por tio? ? Dume mi tamen vivas ankoraŭ, eĉ intereso ne mankas pri lingvaj demandoj kaj mi eĉ tradukis kelkajn versaĵojn de tute junaj gepoetoj. Pro propra plezuro! Malgraŭ la ”bona” okulo (ja nur unu momente funkcias) mi tamen rapide tralegis ”Grandan Kaldronon” — iu donis por du semajnoj. La libro mult-

rilate estas interesa, sed ne facile oni tuj ĉion klare komprenas. Intermiksiĝas la du militoj kaj la personoj nur iom post iom iĝas pli reliefaj. Leviĝas ankaŭ kelkaj lingvaj demandoj. Mi devos ankoraŭ ĉion pripensi. La lasta legita libro estas japana ”Ainaj Jukaroj”; ĝin mi legis kun ia aparta intereso. — Kaj kiel nun rilate Omar Kajjam? — Mi ĝojis pri la artikolo de Roger Bernard: jes, jam **tro detale** oni ekparolis pri la planlingvoj. — La 100-jara jubileo ne estas plu tiel malproksima, kaj eĉ V. Setälä kvazaŭ ekfervoriĝis pro alfabetŝanĝo! ! Do oni havas multon pri kio miri.

Por ke la letero estu pli poezia, jen mi aldonas versaĵon de tute nova juna poetino Mari Vallisoo.

Reveno

Kiam la voj’ min ree hejmen gvidis,
mi ja erare preter propra dom’ rapidis.
For la pordego, kaj nenia sekuro.
La dompord’ aperta kaj eĉ sen seruro.
Hundo forestis, la afabla lekulo,
benkon ekserĉis vane la okulo.
Mi en la ĉambroj ne povis vidi
ion, sur kio eblus eksidi,
kie kurtenon densan mi trovu,
por ke iu enrigardi ne povu.
Fostoj pordegaj kadavre mutis.
Mi la donacojn sur tablon ŝutis —
sep panetojn kaj bulkojn samkvante,
ili nun tie kuŝos ŝimante...

Mi deziras al vi ĉion bonan kaj salutas kun amikaj sentoj,

Hilda Dresen

estas tre karakteriza pri ŝi. Ŝi estis unu el tiuj homoj maljunaj, kiuj anstataŭ rigardi ĉiam malantaŭen retenis viglan intereson en aktualaĵoj. Nelonge antaŭ sia morto ŝi skribis al mi:

”Ĉe ni estas aperintaj nun kelkaj interesaj novaj verkistoj — ankaŭ prozistoj (ne nur gepoetoj). Mi penas esti informita pri ĉio — do legas kiom kapablas nian novan estonan literaturon — ĉar ĝi interesas min. Ĉiuj havas sian propran vizaĝon, estas ankaŭ interese konatiĝi kun la kritikoj — nun oni multe postulas ĝuste de la kritikistoj. Eble mi malŝparas tiel mian tempon, sed kion fari.”

Leganto eĉ ne konjektus pri tiaj tekstoj, ke ili estas tradukoj, se li ne scius anticipe. Tio estas mezurilo pri ŝia talentego.

Ĉefe al tradukado dediĉis sin tiu ĉi poeto-majstro. Tamen ne tute. En *Dekdu poetoj* (red. Kalocsay, 1934), aperis 11 ŝiaj poemoj, kaj en 1967 aperis ŝia volumo *Norda naturo*. Kalocsay trovis ŝian poezion melankolia: ”Melankolio estas la grundtono de ŝia poezio: melankolio pri si kaj pri la homoj”; tion konfirmis en 1967 Tárkony. Sed tion mi mem ne trovas. Hilda estis homo pozitiva, kuraĝa, diligenta. Ŝajnas al

Rimporreto XVI

Hilda Dresen — padus' odoras
Super degela marĉa ŝlim',
Betuloj en la malproksim'
Blanktrunke vintron rememoras.
Sub frosta norda krusto floras
Kaŝitaj sentoj en anim',
Hilda Dresen — padus' odoras
Super degela marĉa ŝlim',
Nun, aŭdu, sur la lir' sonoras
Sudlande arda koresprim',
Kaprica ritmo, sorĉa rim':
Marie Under ardfosforas. . .
Hilda Dresen — padus' odoras.

1931

Kolomano Kalocsay

Mortis Hilda Dresen

En Estoni' paduso falas;
veas la vento el la nordo
kun plora muĝo pri la morto;
fino, funebro, aktualas.
Sed blankaj floroj jam kristalas
per juveligo de la vorto;
kvankam paduso fine falas,
veas la vento el la nordo.
La delikata art' realas,
observo, sento, vero, ordo,
senmortaj verkoj, belo-forto;
Ĉu trunkon nun nur neĝ' vualas?
Paduso daŭre blankpetalas.

1981

Marjorie Boulton

Aparte plaĉas al mi tiu lasta frazo; ĝi pravas kiel neŝablona restis la menso de Hilda ĝis la fino. Ĉiuokaze, per *Estonia soveta poezio* kaj per *Lumo de Orienta Eŭropo* de Vladimir Beekman (1978) Hilda kvazaŭ ĝisdatigis nin pri sia amata estona literaturo. Ne la malplej granda el ŝiaj atingoj estis: instrui al ni, kiel esti samtempe patrioto kaj ĝiskora esperantisto.

La lasta el ŝiaj tradukvolumoj aperis pasintjare, kaj eble eĉ pli ol la aliaj atestas ŝian majstrecon — ĉar el ĉiuj literaturaj formoj la plej malfacile transdonebla estas ĝuste la liriko, kies sukceso dependas malpli de intelekta-racia enhavo ol de lingva beleco kaj sugestio. Kaj la poemoj de Juhan Liiv en *Al abelujo ĝi flugas* (1980) estas profunde lirikaj. La tradukado de Hilda estas brila:

Mi laŭ trista vojo iris,
iris mi laŭ trista voj';
zorgojn multajn mi akiris —
nun mi sola kaj sen ĝoj'!
Ŝton' al ŝtono fale glitis,
fluis riveret' al mar',
ido al hundin' rapidis,
tio ja — natura far'.
Min senhejma faris fato,
kien iru mi, vagant'?
Ho fratin', edzino, frato,
panjo, patro, patroland'!

mi, ke ŝian filozofion, ŝian vivsintenon, plej trafe fanfaras ŝia poemo, titolita:

VENTO

Kirlante neĝon furioze,
sur ebenaĵ' galopas vent',
ĝi flugas, flugas senripoze,
ne haltas ĝi eĉ por moment'.
Sur voj' timeme hom' veturas,
kaj tremas, tremas de la frost',
la vent' rikane preterkuras
kaj trapenetras lin ĝis ost'.
Incitas venton inertuloj
kaŭrantaj en senmova stat',
dum ŝirmon serĉas la okuloj
kaj almozadas pri kompat'.
La venton nur kuraĝ' imponas,
nur hom' de l' sankta malkviet',
al li ĝi frate manon donas,
ke li kunkuru kun impet'.
Ĝi volas, ke dum kur' ekardu
kaj palon perdu lia vang',
ĝi volas, ke la hom' sin hardu
kaj ŝtorme fluu lia sang'.

Tia estis la Hilda, kiun mi konis. Mi bedaŭras, ke mi ne povis koni ŝin pli bone, pli intime. Ŝiaj leteroj, kun tiu karakterize forta skribmaniero, ĝenerale akompa-

nitaj de novaj poemoj kaj plenaj de informoj kaj novaĵoj, tre mankos al mi. Sed al nia movado entute ŝi tre mankos. Post 58 jaroj de konstanta laboro, senmanka fideleco, kaj genia verkado, kie ni trovos ŝian anstataŭanton? Ni ne trovos; tiaj homoj estas unikaj. Ni ĝoju nur, ke ni havis ŝin. Dum niaj koroj spertas la pezon de funebra tristo, ni estu tamen kontentaj, ke ĝis la lastaj momentoj tiu bela animo ne kadukiĝis, sed nur la maljuna korpo finfine endormigis ŝin. Ke ŝi dormu trankvile.

William Auld

INSTRUADO:

Antaŭ ol komenci Esperanto-kurson

LA PROBLEMO, kiel komenci la kurson de Esperanto, kiel daŭrigi la instruadon por atingi sukceson, fariĝas ĉiam pli grava, ĉar ĉiujare la nombro de la kursoj pli kaj pli kreskas. Montriĝis, ke pro manko de kvalifikitaj kursgvidantoj, multajn el inter la kursoj gvidas homoj tre entuziasmaj, sed bedaŭrinde ne ĉiam plene preparitaj al la instruado, lingve kaj metodike. Ĉar la kursgvidanto estas plej ofte la unua esperantisto, kun kiu kuntuŝiĝas la kursano kaj liaj metodo kaj konduto plejparte decidas pri la plena aliĝo aŭ nealiĝo de la kursano al la Movado kaj pri la plua interesiĝo pri la E-problemaro, mi permesas al mi, utiligante la

revuon *Esperanto*, prezenti al la novaj, freŝbakitaj kursgvidantoj kelkajn ideojn laŭ miaj propraj spertoj. Alta nivelo de preskaŭ ĉiu E-kurso grandparte dependas de ĝusta aranĝo kaj antaŭpreparo de la instruado fare de kursgvidanto. Ĉiu kursgvidanto devas konscii pri la neceso plani sian laboron. La planado konsistas en la determino de celoj, al kiuj oni strebos, en la divido de la instruado je unuopaj etapoj kaj pripenso de rimedoj kaj metodikaj procedoj utiligendaj por atingi la fiksitajn celojn. Ĉe la planado oni devas preni en konsideron la instruprogramon de E-o, kiu estas kvazaŭ gvidfadeneto de ĉiu instruisto. Analizante la instruprogramon kaj planante diversajn rimedojn por ties realigo, oni devas pripensi elekton de lernolibro, elekton de kompletigaj legolibroj, helpaj instruiloj. En nia plano ni ne povas preterlasi la partoprenon de la kursanoj en la esperantista vivo de la klubo aŭ societo, la partoprenon en diversaj esperantistaj solenaĵoj kaj kampanjoj, kio pli firme ligas la kursanojn al la Movado. Ĉar la plimulto de la kursgvidantoj bazas sian instruadon sur lernolibro, estas rekomendinde, ke oni konatigu kun ĉiuj lernolibroj disponeblaj en la lando, kaj — se tio estas ebla — kun kelkaj pli bonaj lernolibroj diverslandaj. Ĉiu E-instruisto **rajtas** kaj **devas** elekti tiun lernolibron, kiu — laŭ la vidpunkto de la aplikita metodo — plej taŭgas por la koncerna kurso. Decidante pri la elekto de tiu aŭ alia lernolibro oni devas preni en konsideron la aĝon kaj sekson de la lernantoj, ilian edukitecon kaj konon de fremdaj lingvoj, la profesion medion, el kiu ili devenas, la nombron de instruunuoj destinitaj por la tuta kurso, la oftecon (en semajno) kaj longecon de la instruunuoj ktp. Nur post la

LINGVO:

Sufikso -eco kaj adjektivaj radikoj

LASTATEMPE estas rimarkebla la tendenco eviti la sufikson **-eco**, ekz. en la esprimoj "la malfacilo de la tasko, la utilo de la rusa lingvo, la gravo de Virgilio, fiero de la homoj" ktp., trovitaj en nia gazetaro. Tiuj formoj estas malĝustaj. En bona kaj korekta Esperanto devas esti: la malfacileco de la tasko, la utileco de la rusa lingvo, la graveco de Virgilio, fiereco de la homoj.

La sufikso -eco estas uzebla kun **ĉiuj** adjektivaj radikoj kaj la derivaĵo indikas la nomon de la kvalito aŭ stato, kiun esprimas la radikoj: boneco, beleco, nobleco, honesteco, libereco, proksimeco, dolĉeco, laceco, neŭtraleco, populareco, perfekteco, ĝusteco ktp. (Komparu: amikeco, homeco, nacieco).

Krom tio oni povas **certajn** (ne ĉiujn!) adjektivajn radikojn substantivigi **ankaŭ** per simpla almeto de -o, kiam la senco tion postulas, t.e. kiam oni bezonas

esprimi ion konkretan: feliĉo, utilo, forto, sano, varmo, profundo, kuraĝo, saĝo ktp. Inter, ekzemple, utilo kaj utileco, forto kaj forteco, kuraĝo kaj kuraĝeco estas granda diferenco, kaj oni ne povas uzi ilin arbitre. Kelkaj ekzemploj: Ni havas de Esperanto multe da utilo. La utileco de Esperanto estas nekontestebla. Li ne havis forton por levi la ŝtonon. La patro provis la fortecon de la glacio. Tuberkuulo estas infekta malsano. Pro malsaneco li ne povis partopreni la kunvenon. Ŝi ne havis sufiĉe da kuraĝo por diri la veron. La kuraĝeco de la entrepreno promesas bonajn rezultojn. Ne ĉiam per aĝo mezuriĝas la saĝo. La saĝeco de la knabo mirigis ĉiujn. En la profundo de la maro, de la scenejo, de la ĉambro. La profundeco de la lago Bajkal superas 1600 metrojn. Li falis kaj etendiĝis laŭ sia tuta longo. La longeeco de la vojaĝo timigis nin. Zamenhof laboris por la bono de la homaro. La vero, belo kaj bono regu en la mondo.

Kurbo = kurba linio, rekto = rekta linio. Ruĝo, blanko, nigro, verdo, flavo, bluo estas la nomoj de la respektivaj koloroj. Dolora ruĝo aperis sur ŝia vizaĝo. La verdo estas la koloro de la espero. La flavo de la ovo. Nigro sur blanko.

Henrik Seppik

pripensoj de ĉiuj menciitaj faktoroj — oni elektas lernolibron.

Inter la esperantistoj troviĝas kursgvidantoj, kiuj neglektas lernolibron, subtakas ĝian valoron tre ofte instruante entute sen lernolibro. Laŭ mia opinio ili faras gravan eraron, ĉar la lernolibro plenumas utilan servan rolon. Ĝi ne nur disponigas diversspecajn dialogojn, konversaciajn tekstojn, skribajn aŭtomatigajn ekzercojn, sed ankaŭ rememorigas, ordigas kaj firmigas la scion akiritan dum la leciono. La lernolibro tre ofte servas ankaŭ al memstara lernado, kiam la lernanto ne povas ĉeesti la lecionon. Kompreneble ĉio ĉi ne signifas, ke la kursgvidanto estu sklavo de sia lernolibro kaj instru, frazo post frazo, fidele laŭ la sinsekvo de la lernolibra materialo. Ne! Tiel instrui oni ne nur ne povas, sed eĉ ne rajtas! Cetere, se oni tiel instruos en la kurso, iu povos ekhavi la suspekton, ke la instruisto konas la lingvon je la proverbaj tri lecionoj pli ol la



kursanoj. La kursgvidanto estu inventema kaj laŭbezone, jen tiel — jen tiel, enkonduku novan materialon, sed ne sekvu blinde la lernolibron!

Multaj instruistoj — por montri al la lernantoj sian altan lingvokonon — emas senĉese dikti, anstataŭigi la lernolibron per notaĵoj aŭ diktaĵoj. La diktaĵoj povas la lernolibron kompletigi, sed ne anstataŭi. Eĉ ne sufiĉe bona lernolibro estas pli utila ol diktitaj notaĵoj, kiuj ja ĉiam okupas multe da tempo, iaforte kaŭzas miskomprenojn kaj eĉ erarojn, kaj povas influi malĝustan alproprigon de iu gramatikaĵo. Resume: kompletigu la lernolibron nur laŭbezone kaj laŭnecese.

Ekde la unuaj lecionoj valoras kutimigi la kursanojn al la legado de E-gazetoj kaj libroj. Tial — oni nepre devas noti tion en la instruplano — estas rekomendinde entrepreni iom-post-ioman legadon de facilaj tekstoj dum kaj ekster la lecionoj (mi pensas pri la t.n. "pontlegaĵoj", kies larĝan sortimenton povas disponigi la Libro servo de UEA). Krome estas rekomendinde utiligi dum la lecionoj esperantlingvajn turismajn prospektojn, kiuj variigas la lecionojn kaj tuj montras

la praktikan valoron de la lernata lingvo (la prospektojn oni povas ricevi senpage laŭ la adresoj indikitaj en la Jarlibro de UEA). La legado de ĉiuj ĉi tekstoj, ofte kun iom pli vasta vortprovizo, postulas paralelan enkondukon de E-vortoj, kion tamen oni ne faru tro frue, ĉar la ampleksaj vortaroj malhelpas koncentrigi sur la fundamenta vortprovizo.

Antaŭ ol komenci la kurson oni devas prizorgi diversajn instruhelpilojn, al kiuj i.a. apartenas diversspecaj tabuloj, geografiaj mapoj (la kursanoj korespondos kaj la mapoj estos necesaj por ĝuste kompreni leteron aŭ kompletigi informojn), bildoj, portretoj, fotografaĵoj. Ili servas por prezenti la vivon en aliaj landoj, por konigi al la kursanoj la plej gravajn eventojn de la Movado (ekz. Universalaj Kongresoj, Zamenhof-monumentoj, Esperanto-stratoj, diverskampaj aktivecoj ktp.). Fotografaĵojn oni povas simple tranĉi el E-gazetoj kaj sekve projekcii per epidiaskopoj. Epidiaskopoj estas uzenda sur ĉiuj ŝtupoj de la instruado — ĝi variigas la lecionon, faras ĝin pli vigla; ankaŭ sonfilmo. Bedaŭrinde ne estas multaj E-filmoj, sed kial ne utiligi tiujn, kiuj ekzistas? Sekve, gramofono kun diskoj; ĝi povas servi al la instruado de bona elparolo, same de kantoj. Ekzemple, oni povas uzi diskokurson de Esperanto. Tre utilas radioricevilo por aŭskulti Esperantajn radioelsendojn, kiujn oni povas ankaŭ surbendigi kaj reaŭdigi en la kursejo. Utilas magnetofono, des pli rekomendinda, ke estas tute facile ricevi altnivelajn surbendigaĵojn ĉe la Magnetofona Servo de UEA. La uzon de ĉiuj ĉi instruhelpiloj oni devas antaŭvidi kaj pripensi antaŭ la komenciĝo de la kurso, por ke ni povu ĝustamomente apliki ilin.

Fine venas la momento de la disdivido de la lingvomaterialo (fiksita en la instruprogramo) je unuopaj metodikaj unuoj (metodika unuo estas parto de la programmaterialo, kiu konsistigas unu temon konversacian, legan aŭ gramatikan). Ĉe tiu ĉi divido ni devas nin gvidi per la samaj kriterioj, kiel ĉe la elekto de lernolibro, do per aĝo, sekso, edukiteco ktp. En nia plano ni ne forgesu pri la lecionoj dediĉotaj al ripetado, sintezado kaj ordigado de la akirita scio. Ni destinu iom da tempo al la historio kaj literaturo de Esperanto, kaj ankaŭ al la informoj pri la aktualaj iniciatoj kaj atingoj en la E-movado sur la landa kaj internacia ŝtupoj.

Jen ĉi tiel ni prilaboras la ĝeneralan planon de la instruado en la kurso, kiun ni dividas — por pli bone plani nian laboron — je monatoj. Kaj laŭ ĉi tiu plano ĝenerala ni devos prilabori planon detalan, por ĉiu unuopa leciono. Oni povas do facile rimarki, ke ĉiu celkonscia kursgvidanto **antaŭ ol komenci E-kurson** devas multon pripensi kaj bone sin prepari al la instruado, por ke ĝi estu laŭeble sukcesa. Neglekto de ĉi tiu tasko estas unu el la bazaj kaŭzoj de tio, ke ofte kursanoj forlasas la lernadon aŭ ilia postkursala lingvokono ne estas kontentiga kaj ne permesas plian memstaran postkursan praktikadon de la lingvo.

Andrzej Pettyn



66a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Brazilio (Brazilo) 1981 07 25 – 08 01

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Adreso de LKK: Caixa Postal 04-0406,
BR-70000 Brasília (DF), Brazilo

Honora Komitato. La Honoran Komitaton de la 66a UK eniras diversaj konataj figuroj de la publika kaj kultura vivo de la lando. Jam akceptis roli kiel Honoraj Prezidantoj de la Kongreso s-roj Said Farhat, ministro de socia komunikado (tre ŝlosila ofico en la brazila registara strukturo), kiu mem lernis la Internacian Lingvon, kaj Alcebíades Aimé Silveira Lamaison, guberniestro de la Federacia Distrikto.

Dua Bulteno presita. La presejo de la Senato de Brazilo senpage presis por ni la Duan Bultenon. Temas pri 36-paĝa ilustrita broŝuro, kiu enhavas ĉiujn gravajn informojn pri la Kongreso. Kun la Dua Bulteno kongresanoj ricevos mendilojn por loĝado, ekskursoj, bankedo, postkongresaj ekskursoj kaj Ĉe-metoda seminario. Aldone, eŭropaj kongresanoj ricevos plurajn informilojn kaj mendilojn pri diversaj flug-aranĝoj, ne nur al Brazilo sed ankaŭ al la 37a IJK en Oaxtepec (Meksikio).

Ekskursoj al akvofalo kaj gemurbo. Okazos du duontagaj urbaj rondveturadoj tra Brazilo plurfoje dum la kongresa semajno, unu kun emfazo de la socikulturaj kaj arkitekturaj aspektoj de la plej moderna ĉefurbo de la mondo, la alia kun pli forta rigardo al ĝia historio. Kongresanoj povos elekti inter du tuttagaj ekskursoj dum la kongresa merkredo. "Fianĉina Vualo" estas la populara nomo de la akvofalo Itiquira, kiun oni atingos trairante iaman savanon, nun plenan je eŭkaliptoj. Sed juvelamantoj elektos nepre la gemurbon Cristalina, kie pli ol kvardek vendejoj ekspozicias topazojn, rubenojn, ametistojn, smeraldojn, akvamarienojn kaj aliajn gemojn, kiuj estas minataj surloke.

Bankedo. Kvankam kongresa bankedo ĉiam estas agrabla, okazas kelkfoje, ke la manĝaĵoj estas inter la malpli interesaj aspektoj de la aranĝo. Tio ne estos vera pri la bankedo en Brazilo, kie plej ekzotikaj viandoj, fruktoj, legomoj kaj trinkaĵoj — precipe ruĝa brazila vino — sin prezentos konkurence al la frandemo de la kongresanoj. Ekzotika — pro sia malalteco — estas ankaŭ la prezo.


Postkongrese tra Brazilo. La Kongreso proponas kvar postkongresajn ekskursojn. Iujn naturamantojn allogos la vizito al Caldas Novas, rivero el varmaj kuracakvoj. Aliaj, kun gusto por fiŝkaptado, elektos aventuron sur

la rivero Araguaia, kie ili povos pasigi tutan semajnon boathotele. Iom pli urbemaj kongresanoj eble preferos Manaus, ekvatoran regionon riĉiĝintan siatempe per kaŭĉukproduktado, kie eblas ne nur renkontiĝi kun la rivero Amazono, sed ankaŭ konatiĝi kun interesa aspekto de la brazila historio. Plian aspekton de la fenomeno Brazilo celos malkovri la ekskurso al Salvadoro, iama ĉefurbo de Brazilo, nun centro de la brazilaj arto kaj kulturo, kun emfazo je ties afrika elemento.


Kotizoj: dua periodo. Se vi neglektis aliĝi al la 66a UK ĝis nun, nepre ekagu antaŭ la fino de marto por eviti plian altigon de la kongresa kotizo. Nun validas la kotizoj de la dua periodo (en guldenoj):

1 Kongresano ne membro individua de UEA	198
2 Kongresano individua membro (MJ) de UEA	176
3 Kongresano individua membro (MA) de UEA	143
4 Edz(in)o de kongresano en kat. 1	139
5 Edz(in)o de kongresano en kat. 2 aŭ 3	123
6 Junulo ĝis inkluzive 20-jara	60
7 Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara	99
8 Blindulo	79

Ĉu unua ekstereŭropa infankongreseto? LKK faris detalajn planojn por okazigi en Brazilo la 19an Internacian Infanan Kongreseton. La unuaj 18 IJKoj ĉiuj okazis en Eŭropo. Junaj esperantistoj kaj iliaj gepatroj nepre helpu rompi tiun malbonan tradicion! La kotizo ja ne prezentas obstaklon: 70 guldenoj por ĉiu infano. Tiu sumo inkluzivas loĝadon, manĝojn, ekskursojn, vizitojn kaj prizorgon dum la tuta semajno. La kongresetejo estos moderna ŝtata infanrestadejo kun pluraj ludejoj, multaj ludiloj kaj plankoj el bona brazila kaŭĉuko. Aliĝiloj estas haveblaj ĉe la konstanta adreso kaj ĉe LKK, kiel ankaŭ ĉe multaj landaj Esperanto-instancoj.



Nacia Teatro en Brazilo: La originala konstruaĵo, en formo de piramido de unu el la pracivilizoj de Latin-Ameriko, estas nur unu el la arkitekturaj majstroverkoj tie.



Ĉiuj vojoj kondukas al Rio: Tre verŝajne neniu venos al la 66a UK sen eluzi la okazon por vizito al la rava Rio-de-Janeiro.

Loĝu malmultekoste. Brazilio estas konsiderinde malpli kosta ol niaj kutimaj eŭropaj kongresurboj, ankaŭ rilate tranoktejojn. Ni disponigos "komunan" loĝejon kontraŭ proks. 60 guldenoj — por la tuta semajno! Temas pri maksimume oklitaj ĉambroj, kun banejo por ĉiu ĉambro aparte.

Rapidu mendi la glumarkon! La orkolora memglua (sur vakspapero) glumarko de la 66a UK montriĝis tre populara. Sendu vian mendon antaŭ ol la glumarko definitive elĉerpiĝos! Cent glumarkoj (minimuma mendokvanto) kostas nur 8,80 (por Nederlando 10,24) gld., inkluzive la afrankon.

Karavanoj — de UEA kaj aliaj. Kun la Dua Bulteno eliros informoj pri ses diversprezaj (de 2595 ĝis 5998 gld.) flugvojaĝoj per Varig (brazila), KLM (nederlanda) kaj Lufthansa (germana, FRG), el dek unu eŭropaj urboj. En ĉiuj flugaranĝoj infanoj (ĝis inkluzive 12-jaraj) ĝuas grandan rabaton. Tiujn flugplanojn aranĝis Universala Esperanto-Asocio post longa negocado kun la menciitaj kaj aliaj kompanioj. Ankaŭ pluraj aliaj Esperanto-instancoj organizas proprajn vojaĝojn al la 66a UK.

Poŝtmarko emisiota. Jam estas definitive decidite, ke la brazila poŝto emisios almenaŭ unu poŝtmarkon okaze de la 66a UK. La emisio okazos nur mallonge antaŭ la komenciĝo de la UK. Universala Esperanto-Asocio nun klopodas organizi filatelan servon por

vendado de la poŝtmarko en la kongresejo; ankaŭ nekongresanoj povos ĝin mende akiri ĉe tiu servo.

Ne timu la temperaturon! Ne forgesu, ke la UK okazos ne en somero sed en vintro sudhemisfera. Tio ne signifas danĝeron de neĝo, sed jes garantias, ke la varmo ne estos multe pli ol dum somero (en la plej belaj tagoj) en la norda Eŭropo. Kutime la temperaturo dum la brazila vintro varias inter 14 kaj 25 gradoj celsiusaj.

Preskaŭ mil kongresanoj. Ĝis la unua semajno de februaro registriĝis 973 kongresanoj, plej multnombre el la kongreslando Brazilo (407) kaj el tiu alia sudamerika centro de esperantista aktiveco Argentino (84). El eŭropaj landoj la plej multajn kongresanojn ĝis nun kontribuas tiu kutima venkanto en kongresaj statistikoj Francio (64). Aliaj kontribuas kiel sekvas: Nederlando 40; Svedio 37; FR Germanio 35; Usono 33; Britio kaj Japanio po 22; Finnlando 21; Belgio, Kanado kaj Norvegio po 14; Bulgario, Hispanio, Hungario kaj Venezuelo po 12; Danlando, Italio kaj Svislando po 10; Aŭstrio kaj Jugoslavio po 9; Pollando kaj Portugalio po 7; Aŭstralio 6; Ĉilio kaj Meksikio po 5; Irlando, Islando, Israelo kaj Urugvajo po 4; Ĉeĥoslovakio, Kolombio kaj Luksemburgio po 3; Ĉinio, Germana DR, Nov-Zelando kaj Sud-Afriko po 2; kaj po 1 Greklando, Indonezio, Jamaiko, Korea Respubliko, Liberio, Peruo kaj Zairio.

„Joĉjo” estas perlo

Recenzas Marjorie Boulton (Britio):

Joĉjo, la amiketo, de Elsa Otto. Den Haag: Internacia Esperanto-Instituto, 1980. 94p. Ilus. 17cm.

Mi intencas ofte rekomendi ĉi tiun libron, ĉar Elsa Otto kreis perlon. Mi kapablas iom verki, eble eĉ bone, sed mi tute ne kapablas verki ion samtempe tiel bonan kiel interesan, kortuŝan, sinceran historion, kaj kun tiel minimuma lingva ekipaĵo, tiel ke ĝi perfekte taŭgas kiel legolibro por komencantoj.

Karmemora, nobla Julio Baghy ofte petis min verki tiel, kaj mi ofte penis, sed mi vere ne sukcesis; ne taŭgas al mia pensmaniero verŝajne. (Ankaŭ mi tute ne kapablas tiel sincere, kompreneme, honeste verki por infanoj. La prezentado de Joĉjo, kiu unue ne volas havi ĝenan fratineton, kiu ne volas lerni Esperanton, estas vere bonega kaj ĝi donas impreson de honesteco al la tuta libreto. Mi mem havas preskaŭ nur negativajn sentojn pri la familia vivo, kaj la familio pli-malpli devas esti la bazo por elementa legmaterialo.)

Elsa Otto tiel naturece, kredeble, metas multajn informojn pri la vera valoro de Esperanto en la kadron de flua, interesa historio pri kredeblaj personoj, ke la libro estas vere bonega instrumento por reteni la intereson de gelernantoj. Kaj, kvankam ĝi ege taŭgas por la lernejoj, la kaŝitaj ironietoj igas ĝin tolerebla ankaŭ por plenkreskuloj. Ĝi ĵus rabis min de parto de mia dormo, frumatene!

Mi vere plej kore kaj sincere gratulas al Elsa Otto, ĉar ŝi kreis ion nepre utilan, tre ĉarman kaj, fakte, veran artverkon de speco, kiun ni tre bezonas. Mi esperas, ke ŝi verkos aliajn libretojn de tia speco. Estas eksterordinare malfacile verki tiel, kaj Elsa Otto brile trafis la celon.

Mendu ĉe UEA: 8,10 (por Nederlando 8,42) gld., plus sendokostoj 10%.

Bone uzebla rikolto

Recenzas W.A.M. van Heugten (Nederlando):

La vivo estas tute alia, de F.W. Poppeck (1913 -). Oberkirch: Esperanto-Informejo, 1980. 32p. 21cm.

Saĝaj kaj instruaj, admonaj kaj kuraĝigaj pensoj, kiujn F.W. Poppeck, fervora germana Esperanto-aktivulo, kolektis kaj esperantigis, konsistigas ĉi tiun volumeton. "Unu sagaca penso ofte valoras pli ol dika libro", diras Poppeck en sia mallonga antaŭparolo. Li konfesas, ke aforismoj, trafikaj eldiroj kaj spritaj pensoj jam en la junaĝo fascinis lin, "ĉar ili ne nur malkaŝas al ni profundajn verojn, sed kelkfoje ankaŭ humorplene aŭ ma-

lice memorigas nin pri niaj malfortecoj, pri homaj mankoj, malvirtoj kaj eraroj".

Ĉi tiuj aforismoj estas kolektitaj el verkoj ĉiuspecaj, el diversaj landoj kaj diversaj jarcentoj. Kelkaj estas de ne konataj aŭtoroj, aliaj de famaj filozofoj. En ĉi tiu lukse presita kajero, la kolektinto grafike elstarigis kelkajn eldirojn, kiuj ŝajnas dividi la kolekton en ĉapitrojn. La aforismo "La vivo ne estas tia, ĝi estas tute alia", de la germana verkisto Kurt Tucholsky, donis la titolon al la kolekto.

Interesa rikolto, uzebla por multaj homoj en multaj cirkonstancoj. Por la esperantistoj aparte trafa devus esti la eldiro de Reinhold Niebuhr: "La idealistoj estas la realistoj de la bono."

Mendu ĉe UEA: 4,80 (por Nederlando 4,99) gld., plus sendokostoj 10%.

Verkoj kiuj mankis

Recenzas Gerrit Berveling (Nederlando):

Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj*, M. Gjivoje (1919-). Zagreb: La aŭtoro (kunlabore kun Eldonejo Gabrielli), 1980. 56p. Ilus. 20cm.

Biblioteka manlibro, Herbert März, Aarhus/Wien: Eŭropa Esperanto-Eldonejo, 1979. 51p. 30cm. AEM-Serio 3-4. ISBN 87 85020 20931.

Kiel antaŭparole prave konstatas Gjivoje, lia verko ne povas prezenti la veran staton de E-literaturo en la bibliotekoj de la tuta mondo. Por tio ja estas bezonate multe pli da informoj ol unuopulo, eĉ plej diligenta, povas atingi. Sed jam nun lia verko certe estas tre interesa. Post historia skizo pri la ekesto de E-kolektoj, tiel privataj kiel publikaj, (montriĝas ekz. ke ie en Soveta Unio tuta — kaj riĉa! — E-biblioteko ŝajne "netroveblas") longa laŭlanda listo mencias, krom konataj nomoj, plurajn ne jam tre famajn kolektojn, el kiuj kelkaj grandiĝis nur lastatempe. Sed ĉion ĉi revuante, mi demandas min, ĉu ni ĝuste aprezas la laboron de niaj antaŭuloj, ĉu ni uzas ĉiujn ĉi bibliotekojn kaj kolektojn? Ekzemple, mi ne ofte aŭdis pri prunto el la amsterdama universitata biblioteko. Ĉu aliloke samas? Ĉu multaj verkoj tie ne ŝimas, senuze? De nun ne plu eblos la senkulpigo, ke ni ne povis eltrovi, kie staras "vice, kamarade kaj komplice sur la altaj murobretoj —" (kiel dirus Auld) la verkoj de nia literaturo. (La konsultlibron eĉ pliinternaciigas resumo en ses nacilingvoj. Trafa ideo.)

* Ĉi tiu libro estas ankoraŭ havebla ĉe la Libroservo de UEA en sia proveldono kiel *Manlibro pri Esperanto en bibliotekoj*. Prezo: 3,60 gld.

La Biblioteka Manlibro konsistas el du partoj: la unua traktas kaŝnomojn, la dua bibliografiojn. La bibliografioj tute senkome alfabete listiĝas, kion iome mi bedaŭras, ĉar estus utile indiki, kiomgrade ili estas kompletaj aŭ fidindaj.

Por multaj certe plej interesa estas la parto pri la plumnomoj. Oni povas deiri de la "burga" nomo aŭ de la pseŭdonimo: du listoj onin gvidas. Literaturvoranto certe ne trovos multon novan, kvankam estas io, fine vidi, kiu do estas tiu Edo Bernasconi. Tamen, pluraj konataj pseŭdonimoj mankas: Peter Peneter prave troviĝas, sed kie sin kaŝis Georgo Peterido Peneter? Kaj Maura do? Aŭ -y? C.E.R. Bumy? K.R.?

Kaj ĉe tiu ĉi lasta kriptonomo mi tuŝas demandon nepre solvendan antaŭ ol iam aperos vere kompleta tia listo: kie ni metu la limon? Ĉu por la Esperanto-publiko gravas, kiu kaŝiĝas sub la indiko Multatuli aŭ Lusin aŭ Thorsteinn frá Hamri? Ĉu tia ĉi listo prefere estu kompleta rilate kaŝnomojn pure Esperantajn? Mi mem certe preferus la lastan.

Mendu ĉe UEA: *Konsultlibro*. . . 12,60 (por Nederlando 13,10); *Biblioteka manlibro* 15,60 (por Nederlando 16,22) gld., plus sendokostoj 10%.

Muziko virin-agada



Recenzas Adrian Hall (Aŭstralio):

Per nia nura vol. Kantas Suzana Kasteiviva. Romo: Parola Kulturo, 1980. Kaseto stereofona, 30-minuta. Dek feminismaj kantoj tradukitaj de R. Corsetti. Kun tekstolibreto.

Estas vere, ke "kelkaj el la kantoj. . . donas alian impreson", rezonas la "preterkonduko" al la tekstoj de ĉi tiu kantokolekto. Temas pri la obstinaj kredoj kaj supozoj de multaj homoj — ne nur viroj — rilate al difinitaj socioloj kaj konduk-kategorioj por virinoj. Certe, kanzonaro ne povas esti detala scienca trakto de la problemo, sed tiu ĉi estas sincera krio, kiu klare kaj sprite montras la malkontenton de multaj virinoj. Eble pli gravaj por multaj legantoj estas la plaĉega muziko kaj melodiaro, kiuj portas la temon.

Rolas du voĉoj, kvar gitaroj, basgitaro kaj fluto. La ĉefa voĉo, de Suzana, estas unuaranga. Ankaŭ la dua voĉo, de Marĉela, ofte kunkreas agrablajn harmoni-

efektojn. Tamen, ŝi ne ĉiam agordas kun la ĉefa voĉo, ekzemple, en "Ol duono".

Ekde la unuaj sonoplukoj oni sentas la kirlan, plensukan etoson de la kanzonoj. La rekanto de "Ol duono" kaptas per sia simpla mesaĝo. La gitaroj interplektas sin kaj bele emfazas la takton. La dua gitarsolo soras kaj serpentas alloge kelkfoje kun plaĉa milda tranĉeco laŭ la sudusona kampara stilo.

Trafe aktuala kaj sarkasma estas "La viroj", de la franca kanzonisto Anri Taŝan. Ĉi-kaze la voĉoj estas efike kunordigitaj kaj la teksto frandinde sprita. La rekanto de "Monahino" (sud-itala popola kanzono) kvazaŭ forportas la aŭskultanton kun sia simpla potenco kaj la rigoreco de la voĉoj. Temas pri la porlibera krio de freneziga monahino. Ege agrabla estas la rula spirala efekto de la gitara enkonduko. Oni ne povas ne kunridi je la sprita ironia etoso de la "Balado pri Ana Brenan", cetere zumiga melodio en kapsvinga ritmo. Same efikas la kvazaŭa batalanto "Kvankam ni virinas", vaste konata kanto de laboristinoj en rizkampoj.

La dua flanko komenciĝas pli triste per la bela kaj malnova lulkanto "Lulas panjo". "Mariŝa", laŭ "origine ĉeĥa popola kanzono", fariĝas ĉi tie efika egaliga pledo. En "Manjo" ni aŭdas la hantecan impreson de la fluto kaj dividas la senton de ĉagreno kaj senanimiĝo kiun incitas la ignoro kaj egoismo de multaj edzoj. Plej imponis al mi, voĉharmonie kaj fonmuzike, la vigla kaj ciganeca "En ĉi-arbaro".

Kiel atendite (cetere, ankaŭ en aliaj lingvoj) oni nepre bezonas la tekston por kompreni la vortojn dum la unua aŭskultado. Sed, ĝenerale, jen alia, proprastila kaj tre agrabla kanzonaro. Ni esperu ke venos pli da muziko virin-agada, ĉar, kiel skribis la preterkonduanto: unu kaseto ne sufiĉas por nei la sperton de mil jaroj.

Mendu ĉe UEA: 18,00 (por Nederlando 21,24) gld., plus sendokostoj 10%.

Emocia vivobildo

Recenzas W. Krikke (Nederlando):

Lidja Zamenhof; Vivo kaj agado, de Isaj Dratwer (1905 -). Antverpeno / La Laguna: TK / Stafeto, 1980. 112p. Ilus. 21cm. Serio Movado 9. ISBN 90 6336 012 6.

Bela libro de 112 paĝoj, el kiuj 20 kun fotoj. Sole tiuj fotoj jam faras ĝin tre valora por tiuj esperantistoj, kiuj ne estas indiferentaj pri la historio de la lingvo. Sur la fotoj estas: Lidja kiel infano, kiel ĉarma knabino, kiel juna virino en multaj landoj de Eŭropo, en Usono, inter kongresanoj, kiel instruistino laŭ la Cseh-metodo, en Pollando en la rondo de familianoj kaj parencoj.

Nur tridek ok jarojn ŝi vivis, dediĉante siajn fortojn al Esperanto kaj al la bahaa religio, kiu donis al ŝi spirittajn fortojn kaj konsolon.

Post konciza, sed klara priskribo de ŝiaj vivo kaj agado, sekvas multaj leteroj de Lidja, ĉiam la teksto presita maldekstre, kaj la bildo de la originalo, iom malgrandigita, dekstre. Bonega, emociiga superrigardo pri la mallonga vivo de la plej juna filino de Zamenhof. Libro aĉetinda kaj konservinda!

Mendu ĉe UEA: 12,00 (por Nederlando 12,48) gld., plus sendokostoj 10%.

REDAKCIA NOTO: Supozeble pseŭdonima Isai Sumber sendis al ni nepetitan recenzon pri la sama verko. Kvankam ni ne kutimas aperigi tekstojn, kies aŭtoroj ne estas konataj almenaŭ al la redakcio, ni escepte ĉi-foje citas kelkajn frazojn de Isai Sumber: "Ĉar al la korespondataj aldoniĝis reproduktaj de la originaloj, oni mem povas kontroli, kiomgrade fidela estis la editorado. En si mem tio estas tre laŭdinda, sed ja bedaŭre, ke tiom da eraroj troveblas! . . . paĝo 48: Lidja neakurate tajpis: **Eny** aŭ **Eby**? Ĉar **n** kaj **b** ambaŭ legeblas samloke. S-ro Dratwer – senaverte – elektas **Eny**, ne menciante, kial; sed je paĝo 52 ni konstatas, ke la celita s-ro nomiĝis **Eby**. . . la plendo de Lidja pri preseraro en *Fabeloj* de ŝia patro: **Contona** anstataŭ **bontona**, preskaŭ ne rekonebliĝas, ĉar nun ŝi (paĝ. 32) plendas, ke anstataŭ **Contona** oni presigis **bontona**!" Nu, interese, ĉu ne? Se Sumber malkaŝus sin al la redakcio, ni povus utiligi lian/ŝian atentan legemon. Cetere, ankaŭ Sumber laŭdas la verkon de Dratwer.

Laste aperis . . .

Ĉelsi i gjuhës Esperanto (Albana ŝlosilo), Usni Arifi. Struga (Jugoslavio): E-societo "La Ondoj", 1980. 36p. 11cm. Kun konciza gramatiko kaj Esperanta-albana vortareto. Prezo: 0,60 gld.

Enseignement expérimental de l'espéranto en 4ème et 5ème années primaires, Claude Gacond. La Chaux-de-Fonds: Commission "L'Espéranto à l'Ecole", 1979. 25p. Mimeo. 30cm. Raporto pri Esperanto-instruado al lernejoj. Prezo: 5,40 gld.

Esperanta-pola nomaro de eŭropaj birdoj, W. Szczepański. Bydgoszcz: Pola Esperanto-Asocio, 1977. 16p. Mimeo. 20cm. Bazita sur *Komunlingva nomaro de eŭropaj birdoj*. Prezo: 2,40 gld.

Esperanto: Uĉebnik po meĝunarodniot jazik (za početnici). Red. Trajko Mirĉevski. Skopje: Makedonia Esperanto-Ligo, 1980. 60p. 20cm. Makedona eldono de la origine kroatserba lernolibro de S. Ŝtimec, Z. Tišljarić k.a. Dek lecionoj, kun makedona-Esperanta vortareto. Prezo: 3,00 gld.

Esperanto za svakoga / Esperanto por ĉiu, Emilija Lapenna. Zagreb: Esperanto-Societo "Bude Borjan", 1980. 56p. 17cm. Tridek lecionoj, kun ambaŭdirekta vortareto. Prezo: 6,00 gld.

Gramatika karaktero de la Esperantaj radikoj, La (Teorio kaj praktiko) (1938), Kálmán Kalocsay (1891-1976). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1980 (fotorepreso). 20p. 20cm. Unu el la plej bonaj klarigoj de la vortteorio, kiun unue ellaboris René de Saussure kaj kiun poste akceptis la Akademio. Prezo: 4,80 gld.

Guto da roso, Rinzo Okumura (1912-). Osaka: La aŭtoro, 1980. 16p. 18cm. 87 haĵoj, originalaj kaj tradukitaj. Prezo: 10,80 gld.

Heraldiko, veksilologio; Terminaro en Esperanto, Jaroslav Klement. České Budějovice: Esperanto-Klubo "La Progreso", 1979. Ĉ. 200p. Ilus. Mimeo. 21cm. Plurlingva gvidilo al la legado de blazonoj kaj flagoj. Prezo: 9,90 gld.

Homaro en dilemo, Helmuth Hoffmann. El la germana tr. Adolf Halbedl. Graz: Josef Eder, s.j. (1980). 8p. 21cm. Pri la kristana mistikismo de Jakob Lorber (1800-1864). Prezo: 3,30 gld.

Horizonto de Soveta Litovio, n-ro 5. Vilnius: Litova Filio de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, 1980. 48p. Ilus. 29cm. Kompilaĵo de tradukitaj kaj originalaj noveloj, artikoloj, poemoj, kantoj. De A. Vaitilavičius venas artikolo "Ortografio de propraj nomoj". Prezo: 3,00 gld.

Klasika periodo, La. Enkondukoj, notoj kaj tradukoj el la franca de Gaston Waringhien (1901-). Ascoli Piceno: Eldono Gabrielli, 1980. 252p. 20cm. Plejado 14. Dulingva kolekto de la franca poezio de la 17a kaj 18a jarcentoj, de i.a. Malherbo, Corneille, Racine, La Fontaine, Molière kaj Voltaire. Prezo: 24,00 gld.

Niaj aŭtoroj sin prezentas al vi; Almanaketo poezia. Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1980. 15p. 21cm. Dek poemoj, originalaj kaj tradukitaj. Prezo: 6,60 gld.

Ni stenografas, Wilhelm kaj Hans Wingen (kun aldonitaj klarigoj kaj tabeloj de R. Eichholz). Bailieboro: Esperanto Press, 1980. 40p. 16cm. Adaptaĵo de la Germana Unueca Stenografio al Esperanto. Unue aperis felietone en 1950-1951. Prezo: 4,20 gld.

Paŝoj al plena posedo (1968). William Auld (1924-). Madrido: Heroldo de Esperanto, 1980 (4a eld.). 229p. 19cm. La plej populara progresiga legolibro, konsistanta el tridek legaĵoj kun ekzercoj. Apendicaj sekcioj (movadaj adresoj, rekomenditaj libroj) ĝisdatigitaj por ĉi tiu eldono. Prezo: 19,50 gld.

Prediko sur la monto, La, Huberto Rohden. El la portugala tr. Délio Pereira de Souza. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1979. 151p. 21cm. Detala analizo de la parolado de Jesuo (Mateo 5-7). Prezo: 6,30 gld.

Systemübersicht der Anpassung der Deutschen Stenografie an die internationale Sprache "Esperanto", Otto Möller. Berlin: Gesellschaft für Stenografie und Maschinenschreiben der DDR, 1979. 12p. 21cm. Adapto al Esperanto de la stenografio uzata en Germana DR. Prezo: 1,20 gld.

Diversaĵoj:

Eŭropa kalendaro 1981/82. Red. kaj ilus. Brigitte Frank-Böhringer. Paderborn: Eŭropa Klubo/Institut für Kybernetik. 107p. 30cm. Deklingva kalendaro, uzebla kiel informilo (lernilo) pri Esperanto. Prezo: 12,00 gld.

Globkrajono kun surpriso "Mi skribas en Esperanto". El metalo kaj plasto, kun simpla, ŝanĝebla kartoĉo. Havebla en diversaj koloroj de la eksteraĵo. Eldonis UEA, 1980. Triona rabato por minimume tri ekzempleroj menditaj samtempe. Prezo: 1,80 gld.

Serenado al fraŭlino Loli kaj kvar aliaj kantoj. Kantas Veselin Damjanov. Pian-akompanas Norbert Soemer. Paderborn: Esperanto-Centro, s.j. (1981). 18cm. 33 t/m, duflanka, stereofona. ECP-2. La titola kanto estas muzikigo fare de la kantisto de poemo de J. Baghy. Prezo: 10,80 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas **la minimuman mendosumon de 15,— guldonoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimume 3,— gld.**

IOM PRI ĈI TIU RUBRIKO

Kelkaj legantoj atentigis nin, ke libroj eldonitaj meze de la pasinta jaro neniam estis menciitaj en "Laste aperis. . .". Tio estas ĝusta atentigo kaj tiaj aferoj regule okazas en la jaroj kiam la Libroservo de UEA eldonas sian katalogon. Ekzemple, la verko *1887 kaj la sekvo. . .*; *Esperantologiaj eseoj IV*, de G. Waringhien, aperis lastmomente en 1980 antaŭ la finredakto de la *Katalogo 1980/82*, ĝi eniris la katalogon, sed ne estis menciita en ĉi tiu rubriko. Simile okazis al kelkdeko da aliaj libroj. Necesas do memori, ke la rubriko servas kiel suplemento al la katalogo, kiun do indas trastudi ankaŭ rilate la plej novajn eldonaĵojn en la jaro de ĝia aperigo. Ni menciis krome, ke en ĉi tiu loko listiĝas novaj libroj nur kiam la Libroservo havas vendeban stokon kaj do povas fiksi la prezojn.

Ĉi tiun rubrikon redaktas: **IAN JACKSON**, p/a Esperanto-Centro, 140 Holland Park Ave., London, Britio, W11 4UF.

EKSTERAJ RILATOJ:

En Esperanto antaŭ granda forumo

PLI OL sescent delegitoj el ĉirkaŭ cent landoj kolektiĝis en Helsinko (Finnlando), inter la 19a kaj la 23a de januaro 1981, por Tutmonda Forumo de la Junularo kaj Studentoj por Paco, Malstreĉiĝo kaj Malarmado. En la nomo de TEJO veturis tien Csaba Lendvay (Hungario, prezidanto de TEJO) kaj Elisabeth Schwarzer (FR Germanio). En la Forumo reprezentigis 38 junularaj organizaĵoj (inter ili TEJO), dum aliaj havis la statuson de observanto.

Viglaĵ diskutoj okazis plurfoje sed, kiel kutime, komplikis ĉion la parolado en aro da diversaj lingvoj. La oficialaj lingvoj estis la angla, la franca kaj la hispana. Dum ĉiuj oficialaj aranĝoj oni interpretis samtempe en ĉiujn tri, kaj foje ankaŭ en aliajn lingvojn. Krome, la finnaj organizantoj jesis la uzadon de ĉiu ajn alia nacia lingvo kaj de Esperanto. Tamen, tiujn oni rajtis uzi nur doninte skriban tradukon en unu el la oficialaj lingvoj. Do, tio estis bona ideo, sed ĝi ne ebligis spon-

tanen reagadon. La TEJO-delegacio tamen kontentis kaj prezentis sian parolan kontribuon en Esperanto. Tiu interveno emfazis subtenon al la streboj por la paco kaj malarmado, kaj atentigis pri la monda lingvo-problemo, kiu estas unu el la praktikaj kaŭzoj de miskomprenoj kaj malharmonio en ĉiuj sferoj de la internacia vivo. Ni menciis, ke nia organizaĵo ne partoprenas politikajn aktivecojn pro la fakto ke ĝi estas neŭtrala. La delegacio de TEJO atentigis, ke la esperantista junularo esence kontribuas al la lukto por la paco kaj pli bona estonteco per sia aplikado de io tute konkreta por la proksimigo de la homoj — la Internacia Lingvo Esperanto.

Aldone al tiu parola interveno, aperis konciza prezento de TEJO en la ĉiutaga bulteno de la Forumo. Tie oni skizis la ĉefan agadkampon de TEJO: "Laŭ la opinio de junaj esperantistoj, la bazaj principoj de la internacia lingva komunikado estas jenaj: ĝi devas esti je dispono al ĉiu, senrigarde al la nacieco, aĝo, profesio, socia rango aŭ kapablo lerni lingvojn. Tio inkluzivas bezonon de rimedo, kiu estas facile lernebla, logika, neŭtrala kaj uzebla en ĉiu kampo de la homa aktivado. Ni, la junaj esperantistoj, rekomendas la Internacian Lingvon Esperanto por la uzo de ĉiu en la mondo."

TEJO-anoj senprokraste tradukis la kvarpaĝan finan dokumenton de la Forumo. Kopioj iris al ĉiu Landa Sekcio de TEJO kaj ankaŭ al la ĉefaj junularaj organizaĵoj, kiuj partoprenis la Forumon. Por aliaj intereso- toj, la traduko estas havebla kontraŭ unu respondku- pono ĉe Elisabeth Schwarzer, Luckauer Str. 6, D-1000 Berlin 61.

Laŭ raporto de
Elisabeth Schwarzer



**37a INTERNACIA
JUNULARA KONGRESO
de TEJO, Oaxtepec
1981 07 10 – 17
Adreso: 37a IJK,
Apartado Postal M-9310,
México 1, D.F., Meksikio**

PROVU AMIKIĜI kun la ĉi-supra monstro! Ne timu, ĉar ĝi tamen estas nur ŝtona. Ĝi salutos vin kiam vi venos al Meksikio por partopreni la 37an Internacian Junularan Kongreson de TEJO ĉi-jare. Intertempe, la monstro servas kiel simbolo de la Kongreso. Kio do nova pri Oaxtepec kaj tien-aj vojoj?

Aperis la Unua Bulteno, bela, multkolora. Ĝi iros baldaŭ al la TEJO-anoj, kun la venonta numero de *Kontakto*. Se vi urĝe bezonas ĝin, vidu la adreson ĉi-supre kaj utiligu ĝin. La temo de la 37a IJK estos "Infano kaj Esperanto", pri kio multe kaj sukcese dum la lastaj jaroj okupiĝis Esperanta Meksika Junularo.

De pluraj flankoj venas konsiloj al la eŭropaj partoprenantoj de la 37a IJK, kiel plej malmultekoste atingi Meksikion (vidu ekzemple en la lasta *Koncize*). Jam

tute definitivaj estas la planoj de UEA por flugkaravano el Amsterdamo. La prezo, kiu inkluzivas ambaŭdirektan flugon kaj 4-tagan restadon (krom la Kongreso), estas 2 139 guldenoj. Aliĝon al la IJK do necesas aparte pagi. La vojaĝo povos okazi laŭ tiu prezo nur, se ĝin partoprenos minimume dek personoj. Pri ĉio ĉi petu apartan prospekton, kun detala programo de la vojaĝo, ĉe la Centra Oficejo de UEA.

FINFINE, DENOVE ESTAS HAVEBLA ĈI TIU POPULARA LER- NOLIBRO DE TEJO!

Ĉu vi parolas tendare?, de Renato Corsetti kaj Mauro la Torre. Roterdamo/Sarajevo: TEJO/Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1980 (3a eld., fotoreprese). 64+27p. Ilus. 20cm. Prezo: 5,10 gld. Triona rabato ĉe la Libroservo de UEA ekde minimume 3 ekzempleroj.



Hinda Unio

- La 27an de januaro, en la Politik-Scienca Fakultato de la Universitato en Puneo (sudoriente de Bombajo), Claude Nourmont-Moon prelegis pri Pollando. La prelego okazis en Esperanto, kun nacilingva interpreto de loka esperantisto. Sekvis vigla diskuto. Pri la mondvojaĝo de s-ino Nourmont-Moon, komitatano de UEA, vidu nian januaran numeron (p. 17).

Ĉeĥoslovakio

- Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko (aliĝinta al UEA) duobligis sian membronombro de post 1978 (laŭ *Esperantisto slovaka*, januaro 1981).

Francio

- Ŝajnas, ke la francaj esperantistoj kongresas pli ofte ol la resto de la Movado. Ilia 73a Franca Kongreso de Esperanto okazos inter la 5a kaj 9a de junio ĉi-jare en Perpignan (Informas: Centre Culturel Espérantiste, 72 av. du Gén. de Gaulle, F-66000 Perpignan). S-ro Alain Poher, prezidanto de la franca Senato, akceptis

la honoran prezidantecon de la Kongreso. La honoran komitaton eniris ankaŭ la senatano F. Palmero, kiu prezentis al la Senato la leĝproponon pri la instruado de Esperanto en la mezaj kaj superaj lernejoj de Francio. La organizan komitaton de la Kongreso gvidas René Llech-Walter (vidu ankaŭ sub "Persone").

Koreo

- La 12a Korea Kongreso de Esperanto okazis en Seulo la 13an kaj la 14an de decembro 1980. Partoprenis 125 personoj el diversaj partoj de la lando. La 13a Kongreso okazos la 24an kaj la 25an de oktobro ĉi-jare, kaj koreanoj esperas pri partopreno



de eksterlandaj esperantistoj. Sur la foto: Han Moo-hyup, prezidanto de Korea Esperanto-Asocio, dum la malferma parolado en la 12a Kongreso.

Informado

- En 1980 aperis entute 307 notoj, artikoloj kaj raportaĵoj pri Esperanto en 81 diversaj gazetoj de Norvegio. La gazetara fako de Norvega Esperantista Ligo dissendas nur tri- aŭ kvarfoje novaĵojn al la gazetaro, sed

Fake

ankaŭ lokaj kluboj kaj unuopuloj aktivas ĉi-rilate. Aparte menciindaj estas la kluboj en Sarpsborg kaj Sauda, kiuj sukcesis aperigi po 40 informojn aŭ artikolojn pri Esperanto en la gazetaro de sia regiono.

Libroj

- Beletraj verkoj estas ankoraŭ ĉiam plej multnombraj inter la Esperantaj eldonaĵoj. Ili tamen bezonas longan tempon por disvendiĝi, malgraŭ modestaj eldonkvantoj, kiuj malofte superas milon da ekzempleroj. Du esceptoj ŝajnas esti atentindaj: *Kredum, sinjorino!*, de Cezaro Rossetti, unue aperinta en 1950, de sia dua eldono en 1974 jam vendis ĉ. 2 300 ekzemplerojn; *Kruko kaj Baniko el Bervalo*, de L. Beaucaire, kun siaj du eldonoj, en 1970 kaj 1974, sukcesis elĉerpiĝi, kvankam la suma eldonkvanto estis 1 760 ekzempleroj. Nun oni konsideras ĝian trian eldonon.

Bibliotekoj

- Sekve de iniciato de s-ino Cobi Pothuizen, profesia bibliotekisto, ĉiuj publikaj bibliotekoj en Nederlando ricevis pasintjare oferton pri aĉeto de la nederlandlingva eldono de la kurso *Esperanto programita* (H. Behrmann / P. Peeraerts). La iniciato rikoltis sukceson: 74 biblio-



- Belgio:** Kvankam Belgio estas tute proksima al nia redakcio, novaĵoj de tie vojaĝas al ni longe. Iu en junio pasintjare sendis al ni foton pri okazintaĵo el februaro 1980. Vi ne vidis ĝin, ĉar ni rifuzis la publikigon. Sed, belgoj pliboniĝas kaj ĉi tiu foto malfruas nur tri monatojn. Ĝi montras (maldekstre) s-ron Marc Demonty, prezidanto de Belga Esperanto-Federacio, kiu al f-ino L. Drèze, prezidanto de la loka E-movado en Lieĝo, transdonas la Trofeon Fyne. Vidu pri tio nian numeron de decembro 1980, p.213.

tekoj mendis la materialon, kiu konsistas el kvar libretoj kaj son-kaseto.

Radio

- En 1980, dek tri radiostacioj el dek landoj elsendis 3 260 programojn en la Internacia Lingvo. Laŭ la koncerna statistiko de Georges Larglantier, redaktoro de nia radio-rubriko, tiuj programoj sume daŭris 1 349 horojn. Proksimume kvar kvinonojn de tiu elsendotempo okupas la ĉiutagaj programoj de Radio Pekino kaj Pola Radio. La nombro de la elsendoj samkiel ilia daŭro estas rekordaj, dum la nombro de radiostacioj restas longe post la jaro 1969, kiam 22 stacioj elsendis en Esperanto. Por komparo: en 1979 okazis 2 983 elsendoj dum 1 082 horoj, kaj en 1978 estis 2 788 programoj, kiuj daŭris 1 018 horojn.

Instruistoj

- Inter la 11a kaj 21a de julio 1981, en la hungara urbo Gödöllő okazos la 15a Internacia Konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). Ĉi-foje oni atendas la partoprenon de kelkcento da geïnstruistoj. Pliaj informoj ĉe: Eduka Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio, p.f. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

Faka literaturo

- László Szilvási (P.k. 193, H-1368 Budapest, Hungario) kompilis kvarlingvan (Esperanto, hungara, angla, rusa) *Radioteknika terminaro-rekomendo*. Szilvási informas ankaŭ, ke "en Hungario estas planata la eldono de 'Radioteknikaj kajeroj' ". Ĝi enhavus la plej interesajn artikolojn el nacilingvaj fakaj revuoj. Kunlaboremuloj bonvolu anonci sin al la ĉi-supra adreso.

Lernolibroj

- Loka Esperanto-Societo en Makedonio (Jugoslavio) kaj la periodaĵo *Voĉo*, kun financa helpo de la Fondaĵo Evolulandoj kaj Institucio Hodler '68, fine, post plurjara preparo, eldonis Esperanto-ŝlosilon por albanoj. La 36-paĝa broŝureto, verkita de Usni Arifi, estas la sola Esperanta lernilo-informilo en la albana lingvo. Preskaŭ samtempe, la 27an de decembro, fondiĝis Esperanto-societo en Priština, ĉefurbo de la

jugoslavia provinco Kosovo, kun plejparte albanlingva loĝantaro. Pluraj aliaj lerniloj de la Internacia Lingvo aperis lastatempe en Jugoslavio. En Skopje eldoniĝis lernolibro por makedonoj. Ankaŭ ĝi verŝajne estas la unua lernolibro de Esperanto en la makedona lingvo (vortaro aperis en 1977). Fakte, tiu lernolibro estas traduko/adapto de alia lernolibro aperinta en Zagreb fine de 1980, kie samtempe aperis ankaŭ lernolibro de E. Lapenna. Komuna trajto de ĉiuj ĉi lerniloj estas ilia koncizeco – malpli ol 60 paĝoj.

Blinduloj

- La moskva eldonejo "Prosveŝĉenie" (Klerigo) eldonis en la brajla skribo la Esperantan tradukon de la romano *La mastro de Kôrboja* de la estona verkisto A.H. Tammsaare. La

eldono (735 ekzempleroj) ampleksas tri dikajn volumojn. Pli frue, la sama eldonejo aperigis brajle la rakonton de L. Promet – *Kuŝanta tigro*.

Bibliografio

- Ĉefe dank' al la kompila laboro de d-ro Verloren van Themaat aperis en 1979 *MLA International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures: Volume III: Linguistics* (Internacia bibliografio de 1979 de la Asocio por Modernaj Lingvoj de libroj kaj artikoloj pri la modernaj lingvoj kaj literaturoj: Volumo III: Lingvistiko) larĝa sekcio "International Languages" ("internaciaj lingvoj") pri Esperanto kaj aliaj planlingvoj. Ĝi mencias 121 librojn kaj artikolojn (8 libroj kaj artikoloj pri tiu temo estas menciitaj en aliaj sekcioj de la libro).

Persono

Nikolov

- Zdravko Nikolov, bulgara fotisto kiu lernis Esperanton antaŭ 20 jaroj, post sia reveno el Stokholmo (tie li estis oficiala fotisto de la 65a UK) aranĝis sukcesan fotoekspozicion "Pejzaĝoj de Svedio". La ekspozicio okazis en la hejmurbo de Nikolov, Veliko Tarnovo (Bulgario), kaj


aŭspiciis ĝin la distrikta konsilio pri kulturo. Nikolov aranĝis memstarajn fotoekspoziciojn ankaŭ dum la TEJO-kongreso en Bulgario (1978) kaj la Universala Kongreso en Svislando (1979).

Llech-Walter

- En la ĵus aperinta volumo 15 de la granda kataluna enciklopedio troviĝas artikoleto pri Renat (René) Llech-Walter, kataluno, kiu de pluraj jardekoj vivas en Francio kaj estas i.a. honora prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto. La artikoleto elstarigas la pli ol duonjarcentan Esperantan laboron de Llech-Walter, kiu aŭtoris ankaŭ librojn pri la katalunaj lingvo kaj literaturo. En la enciklopedio aperas ampleksaj ilustritaj artikoloj ankaŭ pri Esperanto kaj "esperantismo".

Benczik

- La 21an de novembro 1980 en la Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto, la konata beletristo Vilmos Benczik, ĉefredaktoro de *Hungara vivo*, aŭtoro de pluraj libroj pri la originala literaturo en Esperanto, lastatempe ankaŭ komitatano de UEA, doktoriĝis pri fremdlingva instrumentodiko per sia disertacio "Sinteza legado de fremdlingvaj beletraj verkoj".



Zdravko
Nikolov

NOVA PERANTO EN KOLOMBIO

Dum la lastaj 8 jaroj inĝ. Diego Hoyos Escobar aktivis kiel la peranto por UEA en Kolombio. En tiu periodo la nombro de individuaj membroj de UEA tie pli ol triobliĝis. Nun, pro baldaŭa vojaĝado, s-ro Hoyos retiriĝos el tiu funkcio. UEA kore dankas lin pro la laboro farita kaj la kontentigaj rezultoj, kiujn ĝi portis. La nova peranto en Kolombio estas s-ro Luis Guillermo Restrepo, Apartado Aéreo 4262, Medellín, Kolombio; telefono (94) 352539.

PLIA HEREDAĴO POR UEA

Nelonge post la heredaĵo Ravestein-Basters, la kapitalo de UEA ricevis plian injekton (vidu ĉi-sube) el la heredaĵo de Cornelis Pot, malnova nederlanda dumviva membro de UEA, kiu forpasis en aprilo 1977. La heredaĵo ne povis esti elpagita pli frue pro diversaj juraj komplikajtoj. Cornelis Pot estis la inventinto de la facila muzikskribo, al kiu li donis la nomon "Klavarskribo".

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Kanado: B. Johnson. Usono: S-ino J. Dinnel; L. Evans; S-ino M. Zarchy.

SOCIETO ZAMENHOF 1981

BRIT: 72 C.M. Houghton. AŬSTRAL: 73 A. Einihovici. BRAZ: 74 José Dias Pinto; 75 Délio Pereira de Souza. KAN: 76 G. du Temple; 77 O. du Temple. DAN: 78 P.V. Bagger; 79 Johs B. Pedersen. FR GERM: 80 Marie Laade; 81 Julie Winter. GANO: 82 Sam Wilson. JAP: 83 Syozi Hosonuma; 84 Tosihide Kuwahara. LUKS: 85 B.R. Moon. NOV-ZEL: 86 D.J. Langman. NED: 87 H.M. Butter; 88 A. Woessink-

Nagata; 89 E.J. Woessink; 90 S.A.K. van der Zee. US: 91 Margaret L. Barkley; 92 G. Chomette; 93 Affonso H. Correa; 94 John T. Dale; 95 Armin F. Doneis sr.; 96 H. Ledeen; 97 V. Palermo; 98 William M. Schulze; 99 William Solzbacher; 100 Ken Thomson. VENEZ: 101 Carlos Levay; 102 Ivo Schenkel. SVED: 103 Lars Andersson; 104 M. Andreasson; 105 M. Colliander; 106 Ragnar Hjort; 107 Elna Jansson; 108 Tore Johansson; 109 Olle Olsson; 110 Elly Persson; 111 Olle Persson; 112 Folke Pettersson; 113 Einar Rasmussen; 114 Sven Sundin; 115 Sten Svenonius.

FONDAĴO CANUTO: Belgio: S. De Weerd 73,80. Finnlando: Inga Hel-singius 60,50. FR Germanio: R. Terjung 24,96. Nederlando: A. Brennan 50,00; R. Moerbeek 500,00; S.A.K. van der Zee 50,00. Svedio: A. Westman 22,00. Sumo jara 5 952,41.

FONDAĴO ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO: Japanio: Tacuo Huĝimoto 285,60. Nederlando: H. H. Weulen Kranenberg 25,00. Sumo jara 310,60.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Francio: S-ino Lloancy 45,20. Svedio: Nils Olsson 92,96. Sumo jara 10 412,38.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: anonima 9 989,55.

FONDAĴO TEJO: Nederlando: E. M. Maasbommel 150,00. Svislando: M. Rich 12,00. Sumo jara 1 240,06.

Antaŭdankon

por frua pago

de via kotizo

por la jaro 1981

DONACOJ 1980 (en guldenoj) ĝis la 31a de decembro (kun resumo pri la tuta pasinta jaro)

ASOCIA KAPITALO: Heredaĵo C. Pot, Nederlando 5 960,00. Sumo jara 23 099,61.

ELDONA FONDAĴO: Sumo jara 6 044,51.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 100,00. Svedio: R. Hjorth 10,00. Sumo jara 7 994,63.

ĜENERALA KASO: Anonima 1 008,00; Anonima 1 000,00. AŬstralio: I. Grahovac 12,50. Finnlando: Aarne Ratalahti 148,50. Japanio: Nisikawa Siroshi 22,40. Kanado: H.D. Hawley 207,90. Nederlando: E.M. Maasbommel 100,00; H.H. Weulen Kranenberg 125,00; S.A.K. van der Zee 250,00. Svislando: L. Grütter 48,01; W. Schaufelberger 26,49. Diversaj malgrandaj 22,44. Sumo jara 8 934,98. PROPAGANDA KONTO: Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 25,00. Sumo jara 15 035,34. FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Anonima 9 989,55. Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 50,00. Sumo jara 12 816,21. NOV-JORKA OFICEJO: Sumo jara 21 230,36 gld.

Sumo de ĉiuj heredaĵoj kaj donacoj en 1980: 123 060,64.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

**UZITAJ POŝTMARKOJ ESTAS GRAVA
SUBTENO AL LA FINANCO DE UEA.
EN 1980 ONI ENKASIGIS TIAMANIE-
RE PLI OL 5000 GULDENOJN! PENSU
PRI TIO KIAM VI SKRIBAS AL UEA!**

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

estas "peono" kaj "aroki". (Vidu *Lingvaj respondoj*, 6a eldono, 1962, n-ro 19.)

4. Renato kondiĉis, ke Fernando povos edziĝi al Jolando, se li gajnos la ŝakpartion; kaze de malvenko, li mortos. Jolando, enamiĝinte al Fernando, lasis lin gajni la partion.

5. Gaston Waringhien, en sia kolekto de esperantologiaj eseoj *Lingvo kaj vivo* (1959), spuras la lingvan historion de la ŝakludo en la parto de sia verko titolita "Interludo II".

6. En 1926, kiam la 3a kongreso de la tutmonda organizaĵo de ŝakistoj okazis en Budapeŝto, Paŭlo Balkányi kaj Fr. Hájek proponis la uzon de Esperanto, sed la federacio ne akceptis ilian proponon tiutempe.

7. Vidante, ke lia reĝo matis, Cezaro starigis ĝin ekster la tabulo sur la randon de la tablo. Kiam Ben Jussuf protestis kontraŭ tiu atenco je la ŝakreguloj, Cezaro kaptis la apude kuŝantan glavon de sia kontraŭulo kaj mortigis lin.

8. Abu Kair, kiel reĝo, alfrontis kaj endanĝerigis ĉevalon (vere tigron), starantan sur la transa bordo de rivero. La besto, ne povante moviĝi por ŝakigi aŭ matigi la reĝon, tutsimple eksaltis kaj tramordis la gorgon de Abu Kair.

9. La fakorganizaĵo por ŝakludantoj parolantaj Esperante estas Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (EŝLI), kiu estis fondita en 1958. Ĝi grupigas ĉiujn ŝakistojn scipovantajn Esperanton, kun la celo ebligi al ili amikajn ŝakajn rilatojn kaj por propagandi la Internacian Lingvon inter ŝakistoj en la tuta mondo.

10. Post la gajno de la ŝakpartio, K. iras al sia hotelĉambro, kie li renkontas imagitajn ŝakpecojn, kiuj devigas lin "rezigni", t.e. mortigi sin. La novelo troviĝas en la libro de Mauro Nervi, *La turoj de l' ĉefurbo* (1978).

DEMANDO 40

(la respondo aperos en nia marta numero)

Sputnikoj kaj raketoj nuntempe estas oftaj objektoj en la spaco de nia sunsistemo, sed ankoraŭ ne estis lanĉitaj grandaj kosmoŝipoj povantaj transporti pasaĝerojn al foraj astroj — krom sur la paĝoj de sciencfikciaj publikaĵoj. Tri originalaj verkoj en Esperanto temas pri tiaj vojaĝoj. Ĉu vi povas identigi la spacŝipon priskribitan en ĉiu citaĵo kaj diri la celon de la eksterteraj vojaĝantoj? Du verkoj estas noveloj; la tria estas romano. La aŭtoroj estas japano, polo kaj usonano.

a. "Ĉi tie estas nia Pegaso de la ĉieloj, kiu povus porti nin al la limoj de la Lakta Vojo dum unu jaro," li diris.

Mi rigardis al la objekto. . . Mi ĉirkaŭis la ĉielirontan Pegason. . . Ĝi estis precize en la formo de pafilkuglo. Oni povus imagi ĝin kiel kanonobuson kelkmilfoje pligrandigitan. Ĝi staris sur sia pli granda fino, eble ses metrojn da diametro, kaj etendiĝis supre pli ol trifoje da longeco kompare al la dikeco, finiĝinta je akra pinto pli ol dudek metrojn super la bazo. Ĝi havis dikajn ripojn kaj trans-ripojn ŝajne faritajn el ia malhela aĵo. Tiuj kvadratoj de metala substanco etendiĝis ekstere kaj protektis la fenestrojn, kiuj, kiel mi poste sciigis, fariĝis el speciale travidebla substanco, multe pli forta ol ordinara vitro. . . ĝi estis multfoje pli forta ol ŝtalo, tamen tiel travidebla, tiom diafana, ke oni povus preskaŭ ne rimarki ĝin, ĝis oni tuŝus ĝin.

b. Ni proksimiĝis al la raketa flughaveno. Videbliĝis jam la interplane-daj raketoj. Ili staris laŭvice kiel longaj metalaj fiŝoj kun trioblaj naĝiloj kaj brilis arĝente en lumo de reflektoroj.

Mia koro batis ekscitite, kiam mi ekvidis sube nian. . . raketon! Jen ĝi staris — flugpreta — en la lumkonuso de grandaj reflektoroj — novbrila . . . belega en sia svelta formo kun etenditaj flugiloj!

(Daŭrigo sur p. 40)

RESPONDO 39

(pri la demando vidu nian januaran numeron)

1. La senco de la citaĵo estas ke la anĝeloj estas multnombraj. Dante pensas pri la legendo de la eltrovo de la ŝakludo. Kiel rekompenco, la inventinto petis de la persa reĝo unu greneron sur la unua kvadrato de la ŝaktabulo, du grenerojn sur la dua, kvar sur la tria, ktp. Ĉiu sekva kvanto estis la duoblo de la antaŭa. Kiam la 64a kvadrato estis atingita, la sumo de la greneroj estis 18 446 744 073 miliardoj, preskaŭ 18 kaj duono da triilionoj da greneroj. La citaĵo en la demando venas de la Esperanto-traduko (1963), kiun Giovanni Peterlongo faris de la ĉefverko de Dante Alighieri, *La dia komedio*.

2. La versoj troviĝas en *Poemoj de Omar Kajam* (1953), tradukitaj el la persa lingvo de Gaston Waringhien.

3. Zamenhof sendis sian respondon al Thorsteinsson el Kopenhago per poŝtkarto datita 3.VI.1901. Li tradukis la germanajn terminojn Bauer per "soldato" kaj rochieren per "rok(ad)i". Hodiaŭ tiuj terminoj

Esperanto en radio

RADIO ROMA ne plu elsendas en Esperanto dimanĉe, sed **sabate** je la sama horo: 20.00-20.20 GMT, per la samaj ondoj: 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz), 31.33m (9575 kHz). Sekve, la programo ne plu estas dissendata je la sama tempo kiel tiu de la Vatikana Radio. Estus bone, se aŭskultantoj skribus dankajn vortojn al Radio Roma pro ĝia saĝa decido. Ankaŭ estos bonvenaj simplaj raportoj pri aŭskulto, sugestoj, rimarkoj, demandoj pri Italio, kritikoj. Raportoj pri aŭskulto valoras nur se ili entenas la jenajn minimumajn indikojn: daton de

aŭskulto, horon, ondlongon aŭ frekvencon, tipon de aparato kaj de anteno, kvaliton de la aŭskulto, almenaŭ unu detalon de la programo, subskribon, adreson klare legeblan. Oni skribu al ĉi tiu adreso: Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma Centro Corr., Italio.

SVISA RADIO posttagmeze kaj vespere elsendas nur per la jenaj tri ondlongoj: 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz); indikoj pri la direktitaj ondoj al Afriko ne plu validas por la esperantlingva programo.

Du ŝtalaj brakoj de aŭtomatulo ekkaptis min, portis min kiel infanon en malheletan rondan ejon, premis min en molan ŝaŭm-kaŭĉukan remburajon de fotelo. Poste mi sentis, kiel albukis min aŭtomata aparato.

c. En tiu dezerta angulo de la universo, izolita de ĉia vigleco de varmo kaj radiado, jen ŝvebas unu objekto senbrila. Laŭforme ĝi impresas kiel granda cigaro, hermetike kirasita per dika metaltavolo.

Preskaŭ trionon de la internaĵo okupas la pelmotoro kaj ĝiaj akcesoraĵoj. La restanta parto estas kompakte plena de diverselementa maŝinaro: optikaj kaj radiologiaj observaparoj, ampleksa memorfako, aŭtomata komputmaŝino, implikitaj cirkvitoj kaj fine la estranta elektronika cerbo. La aranĝo atestas, ke ĝi estas kosmoŝipo plej malavare ekipita sisteme. Kaj ŝajnas, ke malgraŭ la longega vojo riskoplene trapasita la aparatoj ankoraŭ ekzakte funkcias.

Ĉiaspecajn turismajn broŝurojn de la tuta mondo volonte akceptos Næstved Esperanto-Unuiĝo por ekspoziciaj celoj aŭg./sep. Bv. adresi: Grete Nielsen, Fyrrevænget 4, DK-4700 Næstved, Danlando.

J. Lindau el Thionville, Francio, petas siajn letergeamikojn pardoni lin pro lia longa silento. . . certe baldaŭ rompota.

Pri muziko, fotoarto ktp. volas korespondi tutmonde 24-jarulo: s-ro Henryk Miś, Ul. Zakta Dona 14, PL-44-188 Wojska, Pollando.

Mi deziras korespondi per A. pktoj. F-ino Mercè Puigdomènech Sala, Castell de Montbui 1, Sant Feliu de Codines (Barcelona), Hispanio.

Por filatela ekspozicio en septembro ĉi-jare ni danke ricevus bele afrankitajn poŝtaĵojn kaj filatelaĵojn el la tuta mondo, inkluzive de glumarkoj kaj bildkartoj kun Esperanta teksto. Ni rekompencos per la katalogo de la ekspozicio. Adreso: Fridrich Zöld, CS-076 32 Borša ĉ. 368, Ĉeĥoslovakio.

Mia broŝureto de 32 maŝin-tajpitaj folioj, *La maniero kiel dio estis inventita*, ne estas, per mia nura propra kapablo, eldonebla en 2500 aŭ 3000 diversaj regionaj lingvoj de la tuta mondo. Tial mi ĝin kreis en Esperanto, por ke la interesatoj povu ĝin traduki. . . La mondo havas proksimume 3 000 000 da esperantistoj. Pro tio mi opinias, ke la eldono estas interesa. Se vin interesas unu broŝureto en Esperanto por vi mem, aŭ ĝia eldono, petu ĝin (kun send-kostoj, neregistrite) kontraŭ 25 FF al: Trenner, 166 Ave. Daumesnil, F-75012 Paris. Poŝtkonto: Paris 3 941 39 T.

Ni kompilas tutmondan adresaron pri Mormonaj esperantistoj. Helpu nin! Ankaŭ, por ricevi kelkajn eldonaĵojn, skribu! Por-Esperanta Mormonaro, Box 7222, University Station, Provo, Utah 84602, Usono.

Demonstro per ekzemplo: "Rakonto pri admirinda sin-ofero". Prezo (afrankite): 10 francaj frankoj aŭ samvaloraĵo aŭ kvar poŝtkuponoj. Mendu ĉe: F-ino Germaine Kirtz, 5 boulevard Alliés, F-68100 Mulhouse, Francio. Poŝtkonto: 993.48 X F-67900 Strasbourg.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,85 guldenon aŭ unu internacian respond-kuponon (ĝuste stampitan). Pri la enhavo respondecas nur la anoncantoj mem.

Disko en Esperanto: impona kantaĵo, popolkantoj, koruso, solkantistoj. Ĉiuj tekstoj sur la koverto. Tia estas la disko *Songpoemo pri ponto*, eldonita de Islanda Esperanto-Asocio. Prezo: 27,90 guldenoj. Havebla ĉe la Libroservo de UEA (kun triona rabato por samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj).

Nova esperantista grupo, Les Baux de Provence, F-13520 Maussane, Francio, deziras ricevi bildkartojn. Respondo garantiita.

Jenő Zágoni, D kaj FD de UEA, havas novan poŝtan adreson: C.P. 119, R-4000 Sfîntu Gheorghe, jud. Covasna, Rumanio.

Esperanto-restado ĉe maro (Mediterranea!). Ĝi okazos de la 15a ĝis la 20a de septembro 1981 en agrabla feriejo ĉirkaŭita de 3-hektara parko. Programo: diversnivelaĵoj kursoj, ekskursoj, banoj. . . Prezo de 500 ĝis 655 FF. Informo ĉe: Espéranto, 5 Rue Docteur-Roux, F-34000 Montpellier, Francio.

Deziras aĉeti: *La taglibro de Anne Frank*. Prezo? Olsson, Box 114, S-243 00 Höör, Svedio.

Ekspozicio en septembro. Bonvolu sendi dokumentojn pri kultura vivo de la Movado kaj artikolojn pri Esperanto el naciaj gazetoj (kun traduko). Jean Claude Thumerelle, 3bis rue de l'Avenir, F-59130 Lambersart, Francio.

Engex Youth International Ltd. ofertas dum 1981 en Sud-Orienta Anglujo kursojn por lernejoj pri la angla lingvo. Loĝado ĉe anglaj familioj, sperta instruado, ekskursoj. Por grupoj de 16 aŭ pli, 3-semajna kurso kostas 180 pundojn por ĉiu persono. Skribu per adreso: Language Services, 17 High Street, St. Peter's, Broadstairs, Kent, Anglujo.

36-jara viro, oficisto de universitato, deziras korespondi kaj interŝanĝi fotojn, bildojn k.s. pri ĉiutagaĵoj. Nisikawa sirosi, RB 104, Tokiwadai 4-2, Itabasi-ku, Tôkyô, 174 Japanio.

Du vjetnamaj studentinoj volas korespondi tutmonde: Bũi-thi Tô-lan kaj Bũi-thi Tô-mai, 49/5 Luong hũu Khánh, P. 13, Q.I., TP, Hồ Chí Minh, Vjetnamio.

**SOMERAJ
UNIVERSITATAJ KURSOJ,
asocio sen profita celo, serĉas**

**universitatajn
lekciistojn**

**por siaj venontaj sesioj. Ĉiufaka
propono pritraktota. SUK, BP
9, B-LIEGE X, BELGIO**

PRI INTERNACIA LINGVO DUM JARCENTOJ

Kompilis mag. Isaj Dratwer

Eldiroj de filozofoj, verkistoj, sciencistoj, lingvistoj kaj aliaj pri Esperanto kaj la internacilingva ideo. "La tre valora verko de Mag. Dratwer devas esti rigardata kiel suplemento al tiu ĉi libro." (El la antaŭparolo de *Esperanto en perspektivo*.) Dua eld. (1977), konsiderinde ampleksigita kaj ĝisdatigita. 360p. Prezo: 30,00 guldenoj. Ĉefa distribuanto: Libro servo de Universala Esperanto-Asocio.

INTERESAJN LEGINDAJN broŝuretojn eldonis

KVAKERA ESPERANTISTA SOCIETO

Aktualaj pensoj por nuna mondo. Ĉiu verkisto esprimas personan sperton kaj kredon por la vivo.

Mi afrikaniĝis. H.W. van de Merwe. 21 pencoj.

Monda krizo de vidpunkto religia. H. Brückner. 21 pencoj.

Notoj survoje. Damaris Parker Rhodes. 28 pencoj.

Mia spirita pilgrimado. Niranjana Nath Kaul. 30 pencoj.

La lasta estas tute nova. Mi sendos la kvar (inkl. sendokoston) por £1, aŭ egalvaloro, aŭ 7 int. rpk. (20 entute nur £4). Sendu nun al A.J. Leather, 19 Birch Drive, Silverdale, Carnforth, Britujo, LA5 0SE. Ĝirkonto 69 624 9308 (A.J. Leather).

KIU ESTAS LA PLEJ FAMA KRIMINAL-VERKISTO?

Kia demando! Kompreneble
JOHÁN VALANO

Tion ja scias ĉiu. Sed ĉu vi scias ankaŭ, ke en 1981 vi povas legi kriminal-novelon de Johán Valano en ĉiu numero de

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj jare. Jarabono 49,50 gmk aŭ 800,- bfr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio — aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA (52,50 gld.; por Nederlando 54,60 gld.). Kion krom noveloj de Valano vi povas legi en **Monato**, vi vidos petinte provekzempleron kontraŭ du internaciaj respondkuponoj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)

Savu nin

per starigo de la
SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!

♦ Esp/46

La akutega menso de Bertrand Russell admonis jam en 1938, ke se ni ne forigos la unuopajn naciajn armeojn, ni ĉiuj mortos. Kaj li aldonis, ke la malmultaj postrestantoj el tiu masakrego kunvivos en barbareco kaj mizerego. Jen la heredaĵo, kiun ni lasos al niaj gefiloj kaj genepoj, se ni ne vekigos kaj agos senprokraste por malsovaĝigi la politikan aktivecon pere de Superdemokratio. Notu bone, ke jam en 1945 la abomeninda Bombo eksplodis sur Hiroŝima.


♦ Esp/47

Hodiaŭ la homaro havas urĝan bezonon lerni kiel oni kunvivas inteligente en la mondo — ĉar kunvivi stulte kiel ĝis nun oni ne povas plu. La nuna politika kaj socia situacio ne permesas tion. Urĝas transformi la propran politikan opinion, ĝin malsovaĝigante, kaj konsentante rekoni la limojn de la propra klereco kaj necesa libereco, subordigante kiel necese la proprajn nefakajn opiniojn al tiuj de la superdemokrate respondeca gvidanto kaj al tiuj agnoskitaj kiel validaj de la

etika stabo. Ankaŭ vi, do, agnosku la neceson de strata kodo por la homaro kunposedaĵo Tero, kodo, kiu nomiĝas Moralo de Kunvivado.

♦ Esp/48

Nur Dio kaj la pintaj majstroj de Darmo kaj Karmo scias, kio okazos morgaŭ. Certe Eichmann kaj aliaj krimintoj kontraŭ la homaro ne komprenis la sekvon de sia stulta semado. Eĉ tiuj, kiuj hazarde eskapis la nurnbergan tribunalon, fuĝis dum jardekoj de unu kontinento al la alia, severe punate de la konstanta timo esti malkovritaj kaj kaptitaj. La fia atendado estis pli suferiga ol la tribunalaj punordonoj mem. Ĉu la nunaj semantoj de la tria mondmilito — tiuj, kiuj sukcese kontraŭstaras la starigon de mondregistaro — supozas, ke tiu perfida konduto restos senpuna ĉi-foje?



MONDHARMONIIGA INSTITUTO
VIA SPORT 18, I-40065 PIANORO, ITALIO

SUK '81

05-19 julio 1981
en Lieĝo (Belgio)

EKOLOGIO

Sociekonomia bazo de la nuntempa ekologia krizo.

Prof. H. Marinov, Bulgario.

Nova ekologia branĉo esploras ne nur la rilatojn inter la natura medio kaj organismoj, sed ankaŭ ekologion de la homo kaj influon de ties ekonomia agado sur la medio. Kreskado de la loĝantaro, mizeriĝo de la evolulandoj, tro-produktado, inflacio kaŭzas problemojn.

Ekologiaj disponfontoj por elnutrado de la loĝantaro.

Prof. H. Marinov, Bulgario.

La disponeblaj provizoj estas neniam decida faktoro por la plua ekonomia evoluo de la mondo. Pli gravas la problemoj pri la rapida kreskado de la komerco je "naturaj" produktoj kaj danĝero de la nuntempa fabrika agrikulturo. La media malbonigo detruas reciklan sistemon de la naturo.

PEDAGOGIO

Propedeŭtiko de la klerigscienco prospektiva.

Prof. H. Frank, Paderborn.

La starigo de organigramo de pedagogiaj laboroj kiel bazo de difino de la nocio "pedagogio" estas elirekzemplo de la apliko de la kartezia metodo al la klerigscienco. Pedagogio kiel scienco kaj tekniko fariĝas parto de la kibernetiko.

Elementoj de homa fiziologio en rilato kun edukado.

D-ro P. Denoël, Belgio.

Estas konate, ke psika funkcio kaj korpa stato daŭre interrilatas. En sia kontakto kun la lernantaro, la instruisto devas kalkuli kun tiu reciproka reagado kaj prijuĝi ties normalan aŭ nenormalan evoluon. Praktikaj sugestoj kaj utilaj konsiloj.

Enkonduko en la informpsikologion kaj ties pedagogian aplikon. *D-ro S. Lehrl, FR Germanio.*

Starigo de la "organigramo" de la informinterŝanĝo en homoj. Analizo de la funkciado de la sensomatora, kognitiva kaj afekcia komponantoj. Determino de informpsikologiaj parametroj. Korelacioj inter psikologiaj kaj somataj mezrezultoj. Praktikaj aplikoj.



Ebleco partopreni du kursojn samsemajne; perfektiga Esperanto-kurso; studvizitoj; riĉa kromprogramo.

Pliaj informoj kaj aliĝiloj ĉe

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ
BP 9, B-Liège X (Belgio)

Kiu lasis grandsuman monbiletaron sub ŝtono apud malnova kaserolfabriko?

Kial la bela spionino svenis ĉe magazena fotokopiilo?

Kien malaperis la dokumento, kiun ŝi kopiis?

Kiel la konata enketema familio Karal — detektivo Jano, lia edzino Ĝoja la psikologo kaj ilia nevo Stefano — solvos la misteron?

Ĉu li venis trakosme?

Ĉu li venis trakosme?, Johán Valano. Antverpeno / La Laguna: TK / Stafeto, 1980. 144p. 21cm. ISBN 90 6336 019 3. Prezo: 360 Bfr., 22,50 DM aŭ 24,60 gld. Necesas aldoni 10 procentojn por la sendokostoj (nederlandanoj kiuj mendas ĉe UEA pagas imposton 4%).



TK / STAFETO
Miksebaan 65A
B-2130 BRASSCHAAT
Belgio

